# EL POPOLA ĈINIO


中国报道


10 1984




# 35-jara Jubileo de la Ĉina Popola Respubliko


Ĉinio sukcese lanĉis sian eksperimentan komunikan sateliton.





Riĉa rikolto de koton






Olekampo en mateno

# Paŝoj de la nova Ĉinio


de **ĜJANG VEJ** Fotoj de **ŜIN HÙA**

Foto de **ZENG ŜJANGMIN**



Afinaciejo Foto de **LIŬ ŬENMIN**





Teknikistoj laboras super integrita cirkvito.

Novaj loĝdomoj        Foto de ĴU SUJĈU



# ŜLOSILO AL LA HAN-LINGVA FONETIKA ALFABETO

## KONSONANTOJ

| *HFA*[1] | *IFA*[2] | *Ŝlosilo* |
|---|---|---|
| b | [b̥] | spite (sen elspiro kiel speak en la angla) |
| c | [ts'] | celo |
| ch | [tʂ'] | taĉmento (kun la langopinto kurbigita dorsen) |
| d | [d̥] | stelo (sen elspiro kiel steam en la angla) |
| f | [f] | faro |
| g | [g̊] | skizo (sen elspiro kiel skill en la angla) |
| h | [x] | ĥoro |
| j | [tɕ] | ĝi (ne necesas rondigi la lipojn) |
| k | [k'] | knabo (kun elspiro kiel kill en la angla) |
| l | [l] | ol |
| m | [m] | mi |
| n | [n] | ni |
| ng | [ŋ] | ankaŭ (kiel sing en la angla) |
| p | [p'] | sep (kun elspiro kiel peak en la angla) |
| q | [tɕ'] | eĉ (ne necesas rondigi la lipojn) |
| r | [ʐ] | ĵipo (kun la langopinto kurbigita dorsen) |
| s | [s] | plus |
| sh | [ʂ] | ŝlosi (kun la langopinto kurbigita dorsen) |
| t | [t'] | tero (kun elspiro kiel team en la angla) |
| w | [w] | ŭato (vidu klarigon 3. a. kaj b.) |
| x | [ɕ] | ŝtalo (ne necesas rondigi la lipojn) |
| y | [j] | jes (vidu klarigon 3. a. kaj b.) |
| z | [ts] | c (sen elspiro kiel adze en la angla) |
| zh | [tʂ] | aĝo (kun la langopinto kurbigita dorsen) |

## VOKALOJ

| *HFA* | *IFA* | *Ŝlosilo* |
|---|---|---|
| a | [a] | ami |
| ai | [ai] | najlo |
| ao | [au] | laŭ |
| e | [ə] | le en la franca |
| ei | [ei] | hejti |
| er | [ər] | e (kun la lango en pozicio por prononci r kiel err en la angla) |
| i, yi | [i] | vi |
| -i (post z,c,s) | [ɿ] | z vokaligita (vidu klarigon 3.d.) |
| -i (post zh, ch, sh, r) | [ʅ] | ĵ vokaligita (vidu klarigon 3. d.) |
| ia, ya | [ia] | jako |
| iao, yao | [iau] | jaŭ |
| ie, ye | [iɛ] | jeto |
| iou, iu, you | [iou] | joŭ |
| o | [o] | ol |
| ou | [ou] | poŭpo |
| u, wu | [u] | utila |
| ua, wa | [ua] | ŭato |
| uai, wai | [uai] | ŭaj |
| uei, ui, wei | [uei] | ŭej |
| uo, wo | [uo] | ŭo |
| ü, yu | [y] | ü en la germana |
| üe, yue | [yɛ] | [ü + e]* |

### Vokaloj plus n aŭ ng

| | | |
|---|---|---|
| an | [an] | antaŭ |
| ang | [aŋ] | ankaŭ (kiel bang en la germana) |
| en | [en] | enciklopedio |
| eng | [eŋ] | benko (kiel sung en la angla) |
| ian, yan | [iæn] | Stojan |
| iang, yang | [iaŋ] | jankio (kiel young en la angla) |
| in, yin | [in] | infano |
| ing, ying | [iŋ] | inko (kiel sing en la angla) |
| iong, yong | [iuŋ] | jungi [i + ong]* |
| ong | [uŋ] | ungo (kiel ung en la germana) |
| uan, wan | [uan] | ŭan (kiel wander en la angla) |
| uang, wang | [uaŋ] | [u + ang]* (kiel wang en la angla) |
| uen, un, wen | [uen] | ŭen [u + en]* |
| ueng, weng | [ueŋ] | [u + eng]* |
| üan, yuan | [yæn] | [ü + an]* |
| ün, yun | [yn] | [ü + n]* |

* La literoj en la krampoj estas de la Hanlingva Fon. Alf.

## KLARIGOJ

1. Ĉiu ĉina ideografiaĵo formas unu silabon, kiu povas esti skribita fonetike per la han-lingva fonetika alfabeto (HFA). Sed la legantoj bonvolu noti, ke HFA skribas diftongojn per vokaloj, sed ne per helpo de duonvokaloj kiel Esperanto. Ekzemple, **xiǎo** (malgranda) formas unu silabon, sed ne kiel en Esperanto tri silabojn.

2. Por konigi la sonvaloron de la literoj kaj literkombinoj de HFA en la supra kompara listo ni aldonas ekvivalentojn en la internacia fonetika alfabeto (IFA) kaj en Esperanto kaj aliaj lingvoj aŭ klarigojn. La Esperantaj ekvivalentoj ja nature ne povas esti tiom precizaj. Tiu listo servu kiel ŝlosilo al la legantoj, kiuj bonvolu bone konservi ĝin por konstanta uzado en postaj lecionoj.

3. Ĉar HFA celas ankaŭ taŭgigi sin por skribi la buŝan lingvon memstare, ĝi uzas ankaŭ la literojn

**y** kaj **w** por disigi silabojn kaj permesas ĉe iuj okazoj simpligon de skribado. Pro tio bonvolu noti la jenajn punktojn:

**a.** Kiam antaŭ **i** kaj **u** ne estas konsonanto kaj post ili ne sekvas vokalo, antaŭ ili estas aldonataj la literoj **y** kaj **w** respektive, sen influo de la prononco; ekzemple **i** estas skribata kiel **yi** kaj prononcata kiel (i) senŝanĝe, kaj analoge: **in** — **yin, ing** — **ying.** Same estas ĉe **u: u** — **wu.**

**b.** Se antaŭ ili mankas konsonanto en la silabo, sed post ili estas alia vokalo, ili estas rekte skribataj kiel **y** kaj **w** kaj prononcataj kiel (i) kaj (u) respektive. Tio koncernas jenajn kombinojn: **ia — ya, iao — yao, iou — you, ie — ye, ian — yan, iang — yang, iong — yong** kaj **ua — wa, uai — wai, uo — wo, wei — wei, uan — wan, uen — wen, uang — wang.**

**c.** Kiam **iou, uei** kaj **uen** havas antaŭ si konsonanton en la silabo, ili estas skribataj pli simple kiel **iu, ui** kaj **un** respektive, sen ŝanĝo de la prononco.

**ĉ.** Se antaŭ **ü** mankas konsonanto en la silabo, antaŭ ĝi estas aldonata **y** kaj ĝi estas skribata sen supersigno kiel **u**, ekzemple **ü — yu, üe — yue, üan — yuan, ün — yun.** Krome, post **j, q** kaj **x, ü** estas skribata ankaŭ sen supersigno, kiel **ju, qu** kaj **xu.** Ĉio ĉi estas nur simpligo de la skribado sed sen ŝanĝo en la prononco. Post konsonantoj **l** kaj **n, ü** estas skribata senŝanĝe kun la supersigno kiel **lü** kaj **nü** respektive.

**d.** Oni notu ankaŭ ke la vokalo **i** post **z, c, s, zh, ch, sh** kaj **r** ne plu estas prononcata kiel (i), sed nur funkcias kiel signo por formi apartan memstaran silabon.

*1. HFA —— Han-lingva Fonetika Alfabeto*
*2. IFA —— Internacia Fonetika Alfabeto*


# ESPERANTAJ LIBROJ

## Eldonitaj en Ĉinio

| | |
|---|---|
| **SKIZO PRI ĈINIO** | (17-Es-1054P) 104pĝ. broŝ. £0,65 US$1,30 |
| **NOVELOJ DE LUSIN** | (10-Es-1290S) 496pĝ. bind. £2,80 US$4,80 |
| **EL ĈINA POEZIO** | (10-Es-1526) 156pĝ. bind. £2,90 US$5,90<br>broŝ. £2,40 US$4,90 |
| **AŬTUNO EN LA PRINTEMPO** | (10-Es-1525) 116pĝ. bind. £2,90 US$5,90<br>broŝ. £2,40 US$4,90 |
| **AŜMA** | (10-Es-253S) 84pĝ. bind. £0,95 US$1,95 |
| **KANTO DE JUNECO** (Unua parto) | (10-Es-605P) 312pĝ. broŝ. £1,90 US$3,90 |
| **VERKOJ DE VERDA MAJO** | (10-Es-1653S) 510pĝ. bind. £4,20 US$8,50 |
| **RAKONTOJ PRI AFANTI** | (10-Es-1578PA) 78pĝ. broŝ. £0,65 US$1,30 |
| **SAĜO-SAKO** | (10-Es-1778P) 78pĝ. broŝ. £0.50 US$0,95 |

Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Perantoj de EPĈ

aŭ Esperanta Sekcio de Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

La 1-a de oktobro ĉi-jare estas la 35-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Dank' al la 35-jara konstruado la malriĉa kaj popola enspezo estas kalkulitaj laŭ la samkaj potenca socialisma lando. Okaze de tiu solena jubileo ni retrorigardu ĝian iritan vojon.


## MARŜO DE LA MINIMUMA PUNKTO


Kiel konate, la malnova Ĉinio estis agrikultura lando ekonomie tre postiĝinta, kun tre malmultaj modernaj industrioj. En 1949 la produktokvanto de ŝtalo estis 158 000 tunoj, tiu de karbo 32 milionoj da tunoj, tiu de elektro 4.3 miliardoj da kilovatthoroj, kaj tiu de nafto 120 000 tunoj. La nivelo de agrikultura produktado estis malalta, kaj la ekonomia bazo tre malforta. En la sama jaro la produktokvanto de greno estis nur 113 180 000 tunoj, tiu de kotono 444 000 tunoj, kaj la meznombra pokapa enspezo de la popolo kalkulita laŭ la samjara prezaro estis nur 66 jŭanoj (ĉ. 33 usonaj dolaroj).

Ĝuste sur tiu malriĉa kaj postiĝinta bazo la ĉina popolo, en la pasintaj 35 jaroj, starigis sendependajn kaj relative kompletajn industrian sistemon kaj naci-ekonomian sistemon. Komprenеble la konstruado iris ne glate. La nova Ĉinio atingis sukcesojn en sia ekonomio kaj ankaŭ renkontis grandajn malfacilojn. Tamen la rapideco de ĝia ekonomia disvolviĝo superis tiun de la ĉefaj evoluintaj landoj por la sama periodo. Bonvolu rigardi jenan tabelon:

| | Unuo | 1949 | 1983 | kresko |
|---|---|---|---|---|
| Socia totala produktovaloro | miliono da jŭanoj | 55 700 | 1 105 200 | 19.9-oblo |
| Totala produktovaloro de agrikulturo | miliono da jŭanoj | 32 600 | 312 100 | 5.0-oblo |
| Totala produktovaloro de industrio | miliono da jŭanoj | 14 000 | 608 800 | 57.3-oblo |
| Popola enspezo | miliono da jŭanoj | 35 800 | 467 300 | 10.9-oblo |
| Karbo | miliono da tunoj | 32 | 715 | 22.3-oblo |
| Nafto | tuno | 120 000 | 106 070 000 | 884-oblo |
| Elektro | miliono da kilovatthoroj | 4 300 | 351 400 | 81.7-oblo |
| Ŝtalo | tuno | 158 000 | 40 020 000 | 253-oblo |
| Greno | tuno | 113 180 000 | 387 280 000 | 3.4-oblo |
| Kotono | tuno | 444 000 | 4 637 000 | 10.4-oblo |

RIM. En la tabelo la absolutaj produktovaloro kaj popola enspezo estas kalkulitaj laŭ la samjaraj prezoj, kaj la kreskinta oblo laŭ la konstantaj prezoj.






Vaporturbinaj generatoroj ĉiu kun kapacito de 600 mil kilovattoj en streĉa muntado en la Interna Mongolio


## PROSPERIĜO DE ĈIUJ AGRIKULTURAJ BRANĈOJ

La agrikultura produktado de la nova Ĉinio akiris certan sukceson, sed ĝia disvolviĝo estis ne sufiĉe rapida. En la fino de 1978 la Komunista Partio de Ĉinio kunvokis la Trian Plenan Sesion de sia 11-a Centra Komitato, en kiu ĝi serioze resumis siajn sperton kaj lecionojn kaj venis al la profunda kono, ke en la socialisma konstruado oni devas iri sian propran vojon kaj konstrui socialismon kun ĉina karakterizaĵo, konsiderante specifajn kondiĉojn de Ĉinio kaj farante ĉion reale. En la lastaj kvin jaroj ĝi ellaboris kaj praktikis serion da principoj kaj politikoj kaj senĉese akiris rimarkindajn sukcesojn, interalie la sukceso de agrikulturo estas tre inspira.

En la lastaj jaroj, korektinte la antaŭan "maldekstran" eraron en la gvida penso pri agrikulturo, Ĉinio efektivigis la respondecan sistemon de laŭkontrakta produktado. Tio ege levis la produktan aktivecon de kamparanoj, plirapidigis disvolviĝon de la agrikultura produktado kaj plene prosperigis la kamparan ekonomion. Ni komparu la agrikulturan situacion de la 26 jaroj de 1953 ĝis 1978 kun tiu de la kvin jaroj de 1979 ĝis 1983. La jara produktovaloro de agrikulturo kreskis meznombre je 3.2% en la antaŭaj 26 jaroj, kaj je 7.9% en la postaj kvin jaroj. La jara produktokvanto de greno pliiĝis meznombre je 2.4% en la antaŭaj 26 jaroj, kaj je 6.2% en la postaj kvin jaroj. La jara produktokvanto de kotono leviĝis meznombre je 2% en la antaŭaj 26 jaroj, kaj je 4.9% en la postaj kvin jaroj. Dank' al la rapida disvolviĝo de agrikultura produktado, pliiĝis la enspezo de kamparanoj, kaj ankaŭ la kvanto de aĉetitaj produktaj rimedoj rapide leviĝis, tiel ke la agrikultura mekaniza nivelo altiĝis okulfrape. En la fino de 1983 la totala motorforto de la tutlandaj agrikulturaj maŝinoj atingis 245 milionojn da ĉevalpovoj, je 54% pli multe ol tiu en 1978; la nombro de ŝarĝaŭtoj estis 275 000, 2.7-oble pli multa ol tiu en 1978; la konsumita elektroenergio de la kamparo atingis 43.5 miliardojn da kilovatthoroj, kun kresko de 72%; la jara konsumita kvanto de kemia sterko atingis 16 600 000 tunojn, kun kresko de 88%. Precipe menciinde estas, ke ŝanĝiĝis la situacio disvolvi nur gren-produktadon. Samtempe kun la rapida disvolviĝo de kultivado de greno kaj kotono, rapide disvolviĝas ankaŭ forstumado, brutobredado, kromokupo kaj fiŝkaptado.



Laborplena haveno



Lanĉo de alia nova ŝipo

## DISVOLVO DE INDUSTRIO, TRAFIKO, POŜTO KAJ TELEKOMUNIKO

En la fino de 1983 la ĉina industrio posedas fiksan aktivon de 476.8 miliardoj da jŭanoj kalkulitaj laŭ la origina valoro, 31-oble pli multe ol en 1952. En la pasintaj 35 jaroj Ĉinio starigis industriojn de aŭto, traktoro, aviadilo, ŝipo, pezaj maŝinoj, elektroniko, petrolo, kemio ktp. kaj konstruis industriajn bazojn kun granda nombro da ĉefaj modernaj entreprenoj kiel la centro, kiaj Daĉing-petrolkampo, la Ferŝtala Kompanio de Anŝan, Liŭĝjaŝja-hidroelektrejo kaj la Nankina Kemiindustria Kompanio. Iuj novaj industrioj de komputero, lasero kaj novtipaj materialoj estas starigataj kaj disvolvataj. Tamen en la pasinta sufiĉe longa tempo Ĉinio tro akcentis disvolvon de la peza industrio kaj malalte taksis la malpezan industrion. De 1953 ĝis 1978 la produktovaloro de la peza industrio kreskis 26.8-oble, kaj tiu de la malpeza industrio nur 8.7-oble. La longtempa malakordo de proporciaj rilatoj inter la peza kaj malpeza industrioj malhelpis disvolviĝon de la tuta nacia ekonomio kaj altiĝon de la popola viv-nivelo. Dum la lastaj kvin jaroj Ĉinio praktikis la principon de "reordigo, reformado, reĝustigo kaj plialtigo", kaj rapidigis disvolviĝon de la malpeza industrio. En la kvin jaroj de 1979 ĝis 1983 la malpeza industrio kreskis meznombre je 11.2%, kaj la peza industrio je 5.1%. El la totala produktovaloro de industrio tiu de malpeza industrio leviĝis de 43.1% en 1978 al 48.5% en 1983. Jen la proporciaj rilatoj inter la peza kaj malpeza industrioj fundamente akordiĝis. Ankaŭ la produktokvanto de ĉefaj malpezindustriaĵoj grandmezure pliiĝis kaj kontentigis la bezonon altigi la nivelon de la materia kaj kultura vivo de la popolo.

Samtempe kun tio disvolviĝis ankaŭ trafiko, poŝto kaj telekomuniko. Nun en la tuta lando la longeco de fervojoj superis 52 000 kilometrojn, tiu de ŝoseoj 915 000 kilometrojn, tiu de navigeblaj riveroj 108 900 kilometrojn. Oni pligrandigis la havenojn de Ŝanhajo, Tjanĝin, Kantono, Daljan kaj Ĉingdaŭ, kun pli ol 130 ankrejoj por pli-ol-10 000-tonelaj ŝipoj. Rapide disvolviĝas ankaŭ la civila aviado, kies aer-linio atingis proksimume 300 000 kilometrojn, inkluzive de la internacia aer-linio kun ĉ. 100 000 kilometroj. Ĉinio havas aviadajn rilatojn kun multaj landoj kaj regionoj. Krome oni formis poŝtan kaj telekomunikan reton kun Pekino kiel la centro. En Pekino, Ŝan-

hajo kaj aliaj lokoj oni starigis surterajn staciojn de komunika satelito, per kiuj Ĉinio povas rekte telekomunikiĝi kun pli ol 40 landoj kaj regionoj. Oni starigis ankaŭ poŝtajn rilatojn inter Ĉinio kaj pli ol 110 landoj kaj regionoj.

La disvolviĝo de industrio, agrikulturo, trafiko, poŝto kaj telekomuniko akcelis ekonomian, teknikan kaj kulturan interfluojn inter Ĉinio kaj aliaj landoj. Laŭ statistiko de dogano, la totala importa kaj eksporta sumo de Ĉinio leviĝis de 35.5 miliardoj da jŭanoj en 1978 al pli ol 86 miliardoj da jŭanoj en 1983, t.e. la totala eksporta sumo atingis 43.8 miliardojn da jŭanoj kaj la totala importa sumo 42.2 miliardojn da jŭanoj. Nun Ĉinio havas komercajn rilatojn kun pli ol 170 landoj kaj regionoj. En 1983 Ĉinio akceptis 9 477 000 personojn el pli ol 160 landoj kaj regionoj, kiuj alvenis por komerca, scienca kaj kultura interfluoj.



Denove riĉa rikolto de someraj grenoj

Fiŝado sur maro





## ALTIGO DE LA KULTURA KAJ SANPROTEKTA NIVELO DE LA POPOLO


En la lastaj jaroj rapide disvolviĝis la kultura, eduka, sanprotekta kaj fizikkultura aferoj de Ĉinio. Oni konstruis multajn kulturdomojn, muzeojn kaj bibliotekojn. En 1983, en la tuta lando funkciis 122 radiostacioj, 516 sendostacioj kaj relajsostacioj kaj 52 televiziaj centroj; eldoniĝis 340 landaj kaj provincaj ĵurnaloj kun eldonkvanto de 15 500 001 000 ekzempleroj, diversaj gazetoj kun eldonkvanto de 1 770 000 000 ekzempleroj kaj libroj kun eldonkvanto de 5 800 000 000 ekzempleroj. Tio ludis gravan rolon por altigi la kulturan nivelon de la popolo, riĉigi ĝian spiritan vivon kaj starigi ĝian socialisman moralon; en 1983 la ordinaraj altlernejoj havis 1 207 000 lernantojn, la diversaj mezgradaj lernejoj — 46 873 000, kaj la elementaj lernejoj — 135 780 000. Samtempe kun tio funkciis diverstipaj lernejoj por plenaĝuloj, kiaj disaŭdiga kaj televida universitato, korespondaj universitatoj kaj vesperaj universitatoj. Nun la altaj, mezgradaj kaj elementaj lernejoj por plenaĝuloj havas 18 850 000 lernantojn. Sin trovas 37 100 esploraj studentoj, kiuj strebas al la doktoreco kaj magistreco en altlernejoj kaj scienc-esploraj institutoj. Nun en la tuta lando estas 3 253 000 profesiaj sanprotektaj laborantoj, 2 110 000 malsanulaj litoj en hospitaloj, kaj akutaj infektaj malsanoj estas preskaŭ eliminitaj. Dank' al la vigla disvolviĝo de la popola fizika kulturo, altiĝas la sanprotekta nivelo de urbanoj kaj kamparanoj kaj plilongiĝas ilia meznombra vivdaŭro.

## STABILA PROGRESO DE SCIENCO KAJ TEKNIKO

Jam en 1956 Ĉinio ellaboris "Programon de la Perspektiva Plano pri Scienca kaj Teknika Disvolvo por 1956-1967 (projekto)". En mallonga tempo Ĉinio ŝtopis iujn sciencajn breĉojn kaj fortigis iujn malfortajn fakojn.

Post ekflugigo de sia unua satelito en 1964 Ĉinio lanĉis sinsekve diversspecajn raketojn. Dum la lastaj jaroj la ĉina scienca kaj teknika afero pluapaŝe progresis. Je la 18-a de majo 1980 Ĉinio sukcese lanĉis transportan raketon al Pacifiko; en 1982 ĝi subakve lanĉis transportan raketon per submara ŝipo kaj en marto ĉi-jare ekflugigis eksperimentan komunikan sateliton. Tio pruvis, ke la spac-teknologio de Ĉinio jam atingis novan nivelon.

Krome, Ĉinio sukcese elfaris kelkmil specojn de novaj materialoj, el kiuj pli ol 600 estas necesaj por lanĉi transportajn raketojn. Ĝia superkomputero "Lakta Vojo" trapasis ekspertizon. Post sia artefarita sintezo de bova insulino Ĉinio sukcese sintezis en 1981 gistan alaninan transigan ribonukleatan acidon, tiel ke ĝi daŭre iras antaŭe en esplorado de sintezo de makromolekuloj de vivaĵoj.



Leciono en altlernejo

Ĉinio aplikas multajn scienc-teknikajn fruktojn al produktado kaj manifestis grandegan forton de scienco kaj tekniko akcelantan la ekonomian disvolviĝon. Ekzemple, oni inventis kaj aplikas novan teknikon de altforna fandado de vanada-titana magnetito en Panĝihŭa. Oni sukcese hibridigis gluecan kaj negluecan rizplantojn. En 1982 la areo de kampoj por la hibrida rizo estis pli ol 6 600 000 hektaroj, kaj ĉiu hektaro donis kroman produktokvanton de 750 kilogramoj. Vidu alian ekzemplon. Kaŭĉuk-arboj kreskas ĝenerale en la zono inter 15°N kaj 15°S. Ĉinio iniciatis apartan teknikon kreskigi kaŭĉuk-arbojn en la zono inter 18° kaj 24° de la norda latitudo. En 1982 tiaj kaŭĉuk-arboj kovris areon de pli ol 200 000 hektaroj kaj produktis 130 000 tunojn da kaŭĉuko.

Nun Ĉinio ellaboras planon de scienca kaj teknika disvolvo por 1986-2000, por ke scienco kaj tekniko pli bone servu al la socialisma konstruado de Ĉinio.

## PAŜO-POST-PAŜA PLIBONIĜO DE LA POPOLA VIVO

En la lastaj jaroj rapide altiĝis la nivelo de la materia kaj kultura vivo de la ĉina popolo. De 1979 ĝis 1983 la ŝtato laborigis 39 milionojn da homoj, tiel ke la nombro de la homoj vivtenataj de ĉiu urba laborulo malleviĝis de 2.06 (inkluzive de la laborulo mem) en 1978 al 1.71 en 1983. Laŭ statistiko, la meznombra neta enspezo de kamparano en 1983 estis 310 jŭanoj, 1.3-oble pli multe ol tiu en 1978. La totala salajro de la ĉinaj oficistoj kaj laboristoj en 1983 estis 93.46 miliardoj da jŭanoj, kaj ilia meznombra salajro — 826 jŭanoj, je 212 jŭanoj pli multe ol tiu en 1978, t. e. je 34.5% (aŭ 18% post dekalkulo de la diferenco kaŭzita de prez-altiĝo). En la lastaj kvin jaroj la ŝtataj kaj kolektivaj institucioj de Ĉinio konstruis novajn loĝdomojn kun plank-areo de 395 milionoj da kvadrataj metroj, kaj la pokapa loĝdoma plank-areo en urboj kaj urbetoj leviĝis de 4.2 kvadrataj metroj en 1978 al 5.9

kvadrataj metroj en 1983. En la kamparo oni konstruis novajn loĝdomojn kun plank-areo de 2.8 miliardoj da kvadrataj metroj, kaj la pokapa loĝdoma plank-areo leviĝis de 8.1 kvadrataj metroj en 1978 al 11.6 kvadrataj metroj en 1983. Rimarkinde pliboniĝis la loĝkondiĉoj de urbanoj kaj kamparanoj. En la fino de 1983 la deponita mono de urbanoj kaj kamparanoj jam atingis 89.25 miliardojn da juanoj, 3-oble pli multe ol en 1978. La disvolviĝo de produktado kaj la pliiĝo de popola enspezo pluapaŝe prosperigis la enlandan merkaton. De 1953 ĝis 1978, la valoro de podetale venditaj sociaj komercaĵoj kreskis meznombre je 5.2% ĉiujare, kaj tiu de 1979 ĝis 1983 kreskis je 12.8%. La supraj ciferoj montris, ke multe boniĝis la vivo de la ĉina popolo.

## RAPIDIGO DE LA PAŜOJ DE REFORMADO

Estas klaraj la atingoj de Ĉinio akiritaj en la pasintaj 35 jaroj en ĝia socialisma konstruado. Kiel supre dirite, la vojo irita de la ĉina popolo ne estas glata. La erara gvida penso pri la ekonomia konstruado kaj la nenecesaj trocentralizado kaj egalisma distribuado en la ekonomi-administra sistemo vundis la aktivecon de entreprenoj kaj ĝiaj oficistoj kaj laboristoj kaj ne povis plene montri la superecon de la socialisma sistemo.

Por atingi la grandan celon de moderniga konstruado, la Dua Sesio de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko okazinta en majo ĉi-jare faris decidon, ke dum certa estonta tempo la gravito de la tutlanda ekonomia laboro estas reformi la administran sistemon kaj malfermi la pordon al aliaj landoj. Precipe necesas plirapidigi la paŝojn de reformado en urboj, solvi problemojn en la administra sistemo de industrio, konstruado kaj komerco kaj ĝuste trakti rilatojn inter la ŝtato kaj la entreprenoj kaj tiujn inter la entreprenoj kaj iliaj oficistoj kaj laboristoj, por ke la entreprenoj ne profitu el la egalisma distribuado de la ŝtato, nek la oficistoj kaj laboristoj el tiu de la entreprenoj, kaj oni plene levu la labor-entuziasmon de la oficistoj kaj laboristoj, pluapaŝe disvolvu la rolon de marbordaj urboj kaj plivastigu la ekonomian kaj teknikan interfluojn kun aliaj landoj.

Tri jaroj pasis, de kiam Ĉinio komencis plenumi la Sesan Kvinjaran Planon de sia naciekonomia konstruado, kaj la ĝenerala situacio estas bona. En la fino de 1983 la totala produktovaloro de industrio kaj agrikulturo kaj la produktokvanto de pli ol 30 specoj de ĉefaj industriaj kaj agrikulturaj produktaĵoj jam atingis la normojn difinitajn de la Sesa Kvinjara Plano por 1985. Estas antaŭvideble, ke oni bone plenumos la taskojn difinitajn de la plano.

Ŝoseo kondukanta al la Tibeta Altebenaĵo



EL POPOLA ĈINIO 中国报道

1984 N-ro 10

(313)

Monata gazeto eldonata de
ĈINA ESPERANTO-LIGO
P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Generala distribuanto:
Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN)
Esperanta Sekcio
P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

# Enhavo

SUR LA KOVRILO

Gaja danco Foto de ŬENG NAJĈJANG

**Artikoloj por la 35-a datreveno de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko**

Paŝoj de la nova Ĉinio . . . . . 1
Nova fizionomio de la antikva Pekino . . . . . 18
Ŝenĝen — malfermita fenestro . . . . . 35
Paca utiligo de nuklea tekniko en Ĉinio . . . . . 24
Ŝanĝiĝo de Daĉiŭĝŭang . . . . . 14
Nova vivo de olunĉunoj . . . . . 11

**Raportaĵoj**

Eduko servanta al kamparanoj . . . . . 29
Pekina akademio de pentrartoj . . . . . 41
Ĉinaj luktartoj . . . . . 45
Ni intervjuis Ĉu Tunan . . . . . 51
Eksterlandaj studentoj en Ĉin-medicina Instituto. . . . . . 69
Amiko de diverslandaj junaj turistoj . . . . . 66
Retrovo de reĝa maŭzoleo longe perdita . . . . . 62

**Aliaj aspektoj**

Sude kaj Norde de la Granda Muro (10): En Lanĝoŭ-baseno . . . . . 75
MIA VIVO: Mi kaj gastronomio . . . . . 48
VIDINDAJ LOKOJ: Hŭanggŭoŝu-akvofalo . . . . . 57
5 000 JAROJ DE ĈINIO: La politiko de Ĉing-dinastio antaŭ la Opia Milito . . . . . 71
KURANTAJ AFEROJ . . . . . 32
ESP-NOVAĴOJ . . . . . 54
KORESPONDI DEZIRAS . . . . . 56

SUR LA DORSKOVRILO:

Granda Muro post neĝado (Ĉin-stila pentraĵo) de ŬANG ŜAŬMING

# Nova Vivo de Olunĉunoj

Fotoj de **ĈJU ŬEJBO KAJ ŜIN HŬA**

La 4 000-membra olunĉun-nacieco estas unu el la malgrandnombraj naciminoritatoj de Ĉinio. Ĝi vivas ĉefe en Hejlongĝjang-provinco en nord-orienta Ĉinio kaj la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Antaŭ ĉ. 30 jaroj la olunĉunoj vivis nomade. En la jaroj 1953 kaj 1958 la popola registaro fiksloĝigis ilin kaj starigis por ili infanĝardenojn, element- kaj mezlernejojn, vendejojn, hospitalojn k.a. en la loĝpunktoj. De tiam la vivo de la olunĉunoj pliboniĝis jaron post jaro.

Al ĉasado





Olunĉuna loĝpunkto en mateno



Juna patrino



Olunĉunaj virinoj



Olunĉunoj lertaj en kantado kaj dancado

Geknaboj en infanĝardeno



LIŬ ĜENG:

# Ŝanĝiĝo de Daĉiŭĝŭang

"ESTIS tre malofte, ke vi raportistoj gastis ĉe ni kamparanoj," diris mezaĝa kamparano Ma Deljang, ĝoje premante mian manon, kiam mi venis viziti la vilaĝon Daĉiŭĝŭang situantan 50 kilometrojn sude de la urbo Tjanĝin.

Antaŭ mi estas vico da brikaj domoj. Same kiel ĉiuj aliaj domoj sume kun 3 260 ĉambroj nove konstruitaj laŭ sama stilo, la domo de Ma Deljang havis freŝe lakitajn pordkadrojn, sur kiuj estis gluitaj okulfrapaj versparoj. La asfaltita vojo antaŭ lia domo kunligiĝas kun la aliaj 15 nove asfaltitaj vojoj en la vilaĝo. La vidaĵo impresis min ne nur per riĉeco sed ankaŭ per festa atmosfero.

Interne de la pordo staras suna kvar-ĉambra domo. La kvieta korto ĉirkaŭita de brikaj muroj portas tipan tradician formon de loĝejo de ĉinaj kamparanoj. En la helaj kaj puraj ĉambroj estas nova meblaro, televidilo, stereofonia radio-magnetofono, lavmaŝino kaj elektra ventumilo.


Ma Deljang estas 42-jara kamparano. Kiam mi atingis lian hejmon, li ĵus revenis de kamplaboro. Li portis modestajn vestojn kaj iris per fortaj paŝoj, kaj lia sunbruna vizaĝo radiis sanon. Proponante al mi teon kaj cigaredon li diris: "Ekde printempo ne falis eĉ pluvero, sed mi jam kelkfoje akvumis la tritik-kampojn." Li parolis en rezoluta tono, kiu montris, ke li estas sperta en la terkulturado. Lia edzino, kapabla kamparanino, diris, ke pro la dommastrumado kaj zorgado pri la infanoj ŝi povas labori en la kampo nur duontage.


Mi demandis Ma: "Oni diris, ke via vilaĝo estis fama malriĉa vilaĝo en ĉi loko. Kiel vi riĉiĝis lastatempe?"

Kiam la konversacio turniĝis al la riĉiĝo, Ma ekparolis torente.

Daĉiŭĝŭang situas ĉe Tŭanboŭa, la plej malalta loko en la baseno de Hajhe-rivero. Antaŭe tie estis blanka sala-alkala grundo, kaj tiun lokon alterne atakis jen trosekeco jen inundo, tial

Daĉiŭĝŭang-vilaĝo






Presejo de la vilaĝo

malriĉeco ĉiam sorĉe ombris la vilaĝon, kiu produktis sole grenon. Post la Liberiĝo, la kamparanoj fariĝis la mastroj de sia lando, tamen tie la produktado disvolviĝis malrapide. La lokanoj tiel diris: "Ni preferas manĝi nur branojn tri jarojn, ol edzinigi filinon al Daĉiŭĝŭang-anoj." La lokanoj diris al mi, ke en la kvin jaroj de 1972 ĝis 1976 nur 3 fraŭloj de la vilaĝo kun 787 familioj edziĝis. Tiam en la vilaĝo estis 250 fraŭloj en edziĝotaŭga aĝo. Same kiel la aliaj, ankaŭ la geedzoj Ma Deljang povis perlabori maksimume 200 jŭanojn malgraŭ ilia tutjara ŝvitiga laborado. Tiam ili loĝis en kaduka kabano kaj vivis malluksege.

Depost 1978 la popola registaro reviziis la agrikulturan politikon, kuraĝigante la kamparanojn fari multspecajn produktojn kaj praktiki la respondecan sistemon de laŭkontrakta produktado. Dank' al tio leviĝis la produkta aktiveco de la kamparanoj. La gvidantoj kaj kamparanoj de Daĉiŭĝŭang opinias, ke sen industrio kaj kromokupoj ne riĉiĝos la vilaĝo. En la lastaj kvin jaroj la vilaĝo establis laminatejon, fabrikon de elektraj aparatoj, presejon, meblofarejon, porkobredejon kaj aliajn ok fabrikojn kaj metiejojn. La proporcio de agrikulturo en la totala produktado multe malleviĝis, dum la enspezo de industrio kaj kromokupoj konsistigas pli ol 90% de la totala enspezo de la vilaĝo. La kampoj estas iom post iom koncentriĝe kulturataj de malmultaj familioj kaj 80% de la kamparanoj estas liberigitaj de la terkulturado kaj fariĝis laboristoj en sia hejmloko. Januare de 1983 la vilaĝo fondis agrikulturan-industrian-komercan kompanion.

Ma Deljang diris al mi, ke lia familio nun kontrakte kulturas naŭ hektarojn da kampoj, inter kiuj triono estas salaj-alkalaj kampoj malebenaj je unu-metra niveldiferenco. Li kaj lia edzino ebenigis tiun terpecon en daŭro de unu vintro kaj unu printempo malgraŭ ventego kaj neĝado. En 1983, la kampoj estis atakitaj de serioza trosekeco, sed dank' al apliko de sperto kaj sciencaj metodoj en la agrikultura produktado, li rikoltis 49 tunojn da greno kaj 500 kilogramojn da oledonaj semoj. Tiujare lia familio enspezis 16 500 jŭanojn (egale al ĉ. 8 000 us. dolaroj).

Informiĝinte pri tio, mi diris: "Vi enspezas pli multe ol ministro!" La honesta kamparano diris ridetante: "Riĉiĝis ne nur mi sola. Ĉu vi ĵus ne vidis la du maljunajn balaistojn ekster la pordo? Ili laboras maksimume du horojn ĉiutage, sed ĉies jara enspezo superas mil jŭanojn. La 18-jara kelnerino, kiu servas al



Ma Deljang kaj liaj infanoj

vi en la gastejo, enspezis pli ol 2 000 jŭanojn pasintjare."

Ma diris al mi, ke en la pasinteco pro malriĉeco iuj el la loĝantoj de Daĉiŭĝŭang deziris labori en urbo, sed post kiam riĉiĝis la vilaĝo, ne nur ili ne volis labori en urbo, sed ankaŭ 117 urbaj laboristoj memvole revenis en la vilaĝon en la lasta jaro. Ma diris ankaŭ, ke en 1983 en la vilaĝo troviĝas 31 familioj kies jara enspezo superis 10 000 jŭanojn, 159 familioj enspezis pli ol 5 000 jŭanojn kaj 338 familioj — 3 000 jŭanojn.

"Ĉu ankoraŭ restas fraŭlo en edziĝotaŭga aĝo?"

"Ne," respondis Ma, "eĉ la pli-ol-50-jaraj Li kaj Liŭ fondis feliĉajn familiojn."

Forlasinte la hejmon de Ma, mi gastis ĉe direktoro Ju de la kompanio. Parolante pri la ŝanĝiĝo okazinta en Daĉiŭĝŭang, li prezentis al mi jenan tabelon:

"Ĉu la disvolvo de industrio kaj kromokupoj malhelpis agrikulturon?" mi demandis. Pri tio direktoro Ju faris jenan respondon: "Ne estis mirige, ke iuj havas tiun dubon. Sed la fakto diras, ke ĝuste la industrio kaj kromokupoj, per kiuj sin okupas laboruloj liberigitaj de la agrikulturo, multe levis la enspezon de nia vilaĝo kaj ebligis pliigi investon al agrikulturo." Ju diris al mi, ke dum la lastaj kvin jaroj 1 050 agrikulturaj laboruloj ekokupis sin per industrio kaj kromokupo, el kies enspezo oni investis 1.4 milionojn da jŭanoj por disvolvi agrikulturon kaj garantiis la sinsekvajn riĉajn rikoltojn. En 1983 la grena produktokvanto pliiĝis je 200 tunoj kompare kun tiu en 1978, malgraŭ ke multe malpliiĝis la terkulturistoj. Hodiaŭ en Daĉiŭĝŭang estas 23 ŝarĝaŭtoj, 6 grandaj traktoroj, 4 generatoroj kaj 117 tirbestoj. La vilaĝo meĥanizis drenadon, irigacion, plugadon, draŝadon kaj prilaboradon de greno, oledonaj semoj kaj furaĝo. La loĝantoj konstruis pli-ol-mil-metran cementan kanalon likimunan, kiu tre favoras rizkulturadon.

Daĉiŭĝŭang prezentas la vojon, kiu kondukas pli multajn kamparanojn al riĉiĝo.

EKONOMIAJ NORMOJ DE DAĈIŬĜŬANG
(unuo: 10 000 jŭanoj)

| jaro | totala enspezo de industrio k agrikulturo | pura enspezo | neta profito | imposto al la ŝtato | po-kapa enspezo (ekskluzive de la familia kromokupo) |
|---|---|---|---|---|---|
| 1978 | 160 | 80.1 | 23.4 | 9.5 | 167 |
| 1983 | 3 002 | 679.5 | 280.3 | 79.2 | 1 031 |
| jara kresko meznombra | 79.7 | 53.4 | 64.3 | 52.8 | 43.9 |

# TUJ ABONU EPĈ:

# JAM KOMENCIĜIS ABONVARBA KAMPANJO POR 1985

## Ekde l-a nov. 1984 ĝis 28-a feb. 1985

**Tiu, kiu abonos aŭ reabonos dum tiu periodo, senpage ricevos Esperantajn koloran kalendaron por 1985 kaj mapon de la Ĉina Popola Respubliko.**

### ABONTARIFO

| lando | valuto | 1 jaro | 2 jaroj | 3 jaroj |
|---|---|---|---|---|
| Aŭstralio | $A | 9.00 | 15.00 | 21.00 |
| Britio | £ | 5.00 | 8.50 | 12.00 |
| Francio | FF | 60.00 | 100.00 | 144.00 |
| FR Germanio | DM | 18.00 | 30.00 | 42.00 |
| Hispanio | Pts | 900.00 | 1 500.00 | 2 100.00 |
| Italio | Lit | 11 000.00 | 18 700.00 | 26 400.00 |
| Japanio | Yen | 2 000.00 | 3 500.00 | 5 000.00 |
| Jugoslavio | Din. | 300.00 | 500.00 | 700.00 |
| Nederlando | Gld. | 22.00 | 37.00 | 52.00 |
| Portugalio | Esc. | 700.00 | 1 190.00 | 1 680.00 |
| Usono | US$ | 10.00 | 17.00 | 24.00 |
| Kanado | Can$ | 10.00 | 17.00 | 24.00 |

Por aliaj landoj en Eŭropo:

| | valuto | 1 jaro | 2 jaroj | 3 jaroj |
|---|---|---|---|---|
| | £ | 5.00 | 8.50 | 12.00 |
| | US$ | 8.00 | 13.00 | 18.00 |

Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:

| | valuto | 1 jaro | 2 jaroj | 3 jaroj |
|---|---|---|---|---|
| | £ | 2.80 | 4.50 | 6.50 |
| | US$ | 4.00 | 6.50 | 9.00 |

Kore bonvenigata estos ĉiu, kiu volonte varbos abonantojn por EPĈ. Ĉin-stila memoraĵo iros al ĉiu abonvarbanto proporcie al la nombroj de ties varbiloj.

La varbanto sendu abonant-liston kaj abon-pagojn al la loka peranto aŭ sendu la liston kaj pagojn rekte al la suba adreso:

**Esperanta Sekcio de la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.**

*Prospekton kaj prov-ekzempleron oni sendos senpage laŭ peto.*



Ĉe Tjan'anmen-pordego

ĜANG ZUGANG:


# Nova fizionomio de la antikva Pekino

PEKINO estas urbo kun historio de trimil jaroj. Ĝi jam estis vicĉefurbo en Ljaŭ-dinastio (916—1125) kaj ĉefurbo en la dinastioj Ĝin, Jŭan, Ming kaj Ĉing (1115—1911). Ĝi havis tri prosperajn periodojn en sia disvolviĝo kaj poste iom post iom kadukiĝis.

En oktobro de 1949, Pekino fariĝis ĉefurbo de la Ĉina Popola Respubliko. Post 35-jara konstruado la urbo multe ŝanĝiĝis kaj aperis ĝia kvara prospera periodo, kiu multe superis la antaŭajn tri laŭ la skalo kaj enhavo de konstruado.

Dum la 35 jaroj la totala nombro de la loĝantaro en Pekino kreskis de miliono al naŭ milionoj inkl. de kvin milionoj da urbaj loĝantoj. La urba areo ekspansiis de 109 kvadrataj kilometroj al 346 kvadrataj kilometroj kaj formas reton de la urbo, dek loĝpunktoj en la proksimaj antaŭurboj kaj dekkelkaj urbetoj en la malproksimaj antaŭurboj. Pekino nun estas politika kaj kultura centro de nia lando.

En la 35 jaroj jam konstruiĝis loĝaj, publikaj kaj industriaj konstruaĵoj kun plankareo de cent milionoj da kvadrataj metroj, kiuj estas kvinoblo de la totala areo de la konstruaĵoj antaŭ la Liberiĝo. La nove konstruitaj loĝdomoj havas areon de 50 milionoj da kvadrataj metroj, t.e. kvaroblo de la antaŭaj loĝejoj. En la lastaj jaroj la konstruaĵoj en Pekino kreskis po ses milionoj da kvadrataj metroj ĉiujare. Aro post aro leviĝis modernaj domegoj. Dume aperis ankaŭ kulturaj, edukaj, komercaj, higienaj, sportaj kaj aliaj publikaj konstruaĵoj servantaj al loĝkvartaloj. La industriaj



Bejhaj-parko

Gazono ĉe avenuo





Novaj domoj





Sur trotuaro

Ĝardeno en loĝkvartalo



konstruaĵoj kreskas sufiĉe rapide. En 1949 Pekino havis nur kelkajn mezgrandajn kaj malgrandajn elektrejojn, forĝejojn kaj aliajn. Nun en Pekino estas tekstilaj, petrolkemiaj, metalurgiaj, aŭtoproduktaj, maŝinkonstruaj, elektroaparataj, konstrumaterialaj kaj aliaj entreprenoj.

Dum la konstruado de novtipa urbo Pekino gajnis grandan progreson en rekonstruado de la malnova urbo. En 1959 Tjan'anmen-placo estis plivastigita de 11 al 40 hektaroj. La nord-suda kaj okcident-orienta aksoj, kies centro estas Tjan' anmen-placo, etendiĝas je 20 kaj 40 kilometroj respektive. Ili faris la antikvan urbon pli impona. La registaro turnis sian atenton ankaŭ al konservado kaj riparado de konstruaĵoj nacistilaj. Ekzemple, Liŭliĉang, fama kultura strato, nun estas rekonstruata laŭ la tradicia formo.

Nun Pekino jam havas du subterajn fervojojn, du ĉirkaŭurbajn ŝoseojn kaj multajn radiajn stratojn, kiuj formas facilan trafikan reton. La registaro larĝigis tro mallarĝajn partojn de stratoj kaj pavimis trimil stratetojn. Lastajn jarojn aperis unu post alia trefkruciĝoj, kiuj plifaciligis la urban trafikon.

Ankaŭ pri akvo mi volas iom paroli. La prosperiĝo de Pekino en la historio strikte ligiĝis kun solvo de akvoprovizo. Sed la skalo de akvoadministraj konstruaĵoj ne estas komparebla kun la pasintaj. Pekino nun havas du grandajn akvokonservejojn kun kapacito respektive de kvar miliardoj kaj du miliardoj da kubmetroj, 100 kilometrojn longan Pekin-Mijun-an Kanalon, 20 kilometrojn longan Jongding-riveron kaj ankaŭ mezgrandajn kaj malgrandajn akvokonservejojn kaj kanalojn, pere de kiuj oni ĉiujare provizas Pekinon per miliardo da kubmetroj da akvo, donante sufiĉan akvon al la loĝantaro kaj la industria kaj agrikultura produktado. La taga provizkvanto al la loĝantaro kreskis de 86 mil tunoj al 400 mil tunoj.

Ĝardeniga afero de la urbo ricevis okulfrapan sukceson. Krom konstrui aron da novaj parkoj, la registaro faris grandan penadon por konservi kaj protekti palacajn ĝardenojn, plivastigi gazonojn ĉe la antikvaj konstruaĵoj. La verdaj areoj ĉe la Urbodefenda Kanalo kaj loĝkvartaloj donas al la loĝantoj belan vivmedion.

Pekino estas unu el la ses antikvaj ĉefurboj en la historio de Ĉinio. En ĝi troviĝas 24 ŝtatnivele protektendaj historiaj lokoj, kiaj la Granda Muro, la Imperiestra Palaco, la Somera Palaco kaj aliaj. Tial konstrui Pekinon en modernan, belan kaj puran urbon kun origina fizionomio de antikva ĉefurbo estas fundamenta principo de la urba konstruado de Pekino. Nun la magistrato realigas la belan projekton laŭ "la Ĝenerala Projekto de la Urba Konstruado de Pekino".

Strato de Pekino




ŜJU HONGGUJ*:

# Paca utiligo de nuklea tekniko en Ĉinio


NUKLEA energio, komputero kaj kosmonaŭtiko estas la tri grandaj markoj de disvolvo de la moderna scienco. Nun ĉu energio de sputniko ĉu prospektorado de subtera riĉfonto, tute ne povas esti disigataj de nuklea tekniko kaj nuklea energio. La nuklea tekniko estas pli kaj pli vaste uzata en la homa vivo. Ĉinio pace utiligis la nuklean teknikon ne tre longe, tamen jam gajnis ĝojigan progreson kaj montris vastan perspektivon.

La unua pezakva eksperiment-reaktoro de Ĉinio en rekonstruado



La konata radioskopio estas por esplori la internajn organojn de la homa korpo per penetremaj X-radioj por fari diagnozon. Radiologio estas aplikata en multaj industriaj kampoj. Oni plejofte uzas gamaradiojn, kiuj povas penetri dikan metalan platon kaj trovi difektojn en la plato, neniom damaĝe al la metalo mem. Tio estas sendamaĝa kontrolo nemankigebla por ŝipfara, aeronaŭtika kaj maŝinfabrika industrioj. Antaŭe en la Tajjŭan-a Ŝtala Kompanio de la provinco Ŝanŝji, oni mane mezuris la dikon de ŝtala tabulo, tiel ke normaj ŝtalaj tabuloj okupis nur malmultajn elcentojn, kaj plie la produktokvanto ne estis granda. Poste oni ekuzis gamaradian dik-mezurilon, kiu povas kontinue mezuri la dikon de ŝtala tabulo en ĉiu momento. Dank' al ĝi la elcentoj de normaj ŝtalaj tabuloj kreskis duoble, kaj la skipa produktokvanto kreskis kvinoble.


Tiaj nevideblaj radioj estas vaste aplikataj en petrolaj, karbaj, geologiaj kaj metalurgiaj entreprenoj. Por petrol-puto la grava rimedo ŝprucigi longtempe kaj stabile estas injekti akvon en ĝin en frua tempo por teni la stratuman premforton. En la petrol-kampo Ŝengli oni antaŭe injektis radian izotopon jodo 131, kaj analizis la akvosorban sekcon de la puto laŭ la ŝanĝiĝo de la intenseco de la radioj antaŭ kaj post la injekto, tiamaniere evitis blindan injekton de akvo, kaj garantiis la stabilan kaj altan produktokvanton de petrol-kampo. Likas subtera oleodukto truita de korodo, kio kaŭzas teruran tralikiĝon kaj seriozan polucion. Antaŭe por trovi tralikiĝon ne-



Produktejo de radioaktivaj izotopoj

cesis multe da homoj kaj materialoj. Nun la Ŝanhaja Nuklea Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj aliaj unuoj sukcesis en tekniko de radioaktiva spurado de tralikiĝo de subtera oleodukto. Per tiu tekniko oni povas rapide trovi truon kaj precize trafi tre malgrandan truon, ne bezonante fosadon. Tiamaniere oni povas ne nur trovi, sed ankaŭ preventi tralikiĝon, kaj solvis la malfacilan problemon longe nesolvitan.

La tekniko de radiado kaj spurado ludas sian rolon ankaŭ en hidrologia kaj akvoadministra konstruado. La Flava Rivero estas la rivero, kies sablo-kvanto estas la plej ŝanĝiĝema en la mondo. Por ĝin jungi necesas ĝustatempe kaj precize mezuri ĝian sablo-kvanton. En 12 hidrologiaj stacioj ĉe la Flava Rivero, la Akvoadministra Scienca Instituto sub la Akvoadministra Komitato de la Flava Rivero instalis nuklean sablo-mezurilon, kiu povas kontinue observi sablo-kvantan ŝanĝiĝon laŭ la reflekta intenso de la radioj kaŭzitan de sablo-kvanta ŝanĝiĝo. En la lastaj jaroj, en multaj lokoj de la lando oni sukcesis apliki nuklean mezurilon al serĉado de subtera akvofonto, kaj solvis la problemon de akvofonto por trinki kaj irigacii. En urbeto Ŝinglong de provinco Ŝandong, oni elspezis centmilojn da jŭan-oj por fosi akvoputon, sed tute vane. Tial oni konstatis, ke sub tiu urbeto ne estas akvofonto. Tamen poste, la Urania Geologia Instituto sub la Ministerio de Nuklea Industrio kaj la Geologia Brigado de provinco Ŝandong kune faris prospektoradon per nuklea tekniko kaj ne-nuklea tekniko kaj konfirmis la ekziston de subtera akvo. Oni sukcese fosis kelkajn akvoputojn. Kiam el la unua puto ŝprucis akvo, la lokanoj treege ĝojiĝis, kaj tion celebris gongante kaj tamburante.



Pormalsanula balaado per radioaktiva izotopo


En la agrikultura kaj biologia kampoj de Ĉinio, paŝopostpaŝe populariĝas la nuklea tekniko. En agrikulturo la plej okulfrapa ekzemplo estas sukcesa kulturo de nova kotona specio "Lumian N-ro 1" per surradiado. La disvastigo de la nova specio alportis disvolviĝon de la produktado de grandarea kotonregiono ĉe la baseno de la Flava Rivero kaj faris gravan kontribuon al nia memprovizo per kruda kotono. En la tuta Ĉinio la areo de tiuspecia kotono jam atingis preskaŭ 4.7 milionojn da hektaroj, kaj meznombre ĉiu hektaro povas kreskigi produktokvanton je 25%. La Atomenergia Aplika Instituto sub la Agronomia Akademio de provinco Hubej, per spurado de nitrogeno 15, esploris la sorbon de rizplantoj al nitrogena sterko, ties fiksiĝon kaj perdiĝon en grundo, sekve raciigis la sterkadon kaj ege altigis la uzeblecon de nitrosterko. Krome, per radioaktiva izotopa spurado oni esploris la reziduon de diversaj insekticidoj en plantaĵoj, kaj tio sekurigis aplikadon de insekticido. Per sama maniero oni esploris kiel la materio produktita de fotosintezo distribuiĝas al diversaj partoj de planto, kaj tiamaniere difinis la racian denson de plantaĵoj.


Dum la lastaj jaroj oni akiris grandan progreson ankaŭ en apliko de nuklea tekniko al me-

dicina kampo. La izotopa spurado helpas pluapaŝe malkaŝi la delikatan kaj komplikan fiziologian proceson en la homa korpo. Tiu maniero ludas gravan rolon, kiun ne povas aliaj manieroj, por koni la materian bazon de la vivo kaj klare scii la kaŭzon de malsano kaj efikon de medikamento. Dank' al kreskantaj kvanto de izotopoj kaj specioj memproduktitaj de Ĉinio, pli ol 800 hospitaloj de Ĉinio uzas izotopojn en diagnozo kaj kuracado, ekzemple jam pli vaste populariĝas la izotopa diagnozo kaj kuracado al tiroida malsano kaj kancero, la izotopa balaa kontrolo al la organoj en la homa korpo, la radioaktiva analizo kaj mezuro pri imuneco, kaj similaj teknikoj.

Nun la surradia tekniko estas aplikata preskaŭ al vesto, manĝaĵo, loĝado kaj trafiko. De multaj jaroj, en Ĉinio, oni esploras pri konservo de greno, legomoj, freŝaj fruktoj kaj aliaj nutraĵoj per surradiado kaj akiris certagradajn sukcesojn. Tia konservado ne ŝanĝas la originajn temperaturon, humidecon, formon, koloron kaj guston de la konservataj nutraĵoj, nek bezonas kemiaĵon, nek kaŭzas polucion. Ĝi povas elimini en mal-

Marki kemian kombinaĵon per radioaktiva izotopo





Surradiado al plantoj per gama-radioj de kobalto 60

longa tempo tion, kio kaŭzas putriĝon de nutraĵoj. La Izotopa Instituto de provinco Henan prilaboris terpomojn, cepojn kaj ajlojn per gamaradioj de kobalto 60, kaj trioble longigis ilian konserveblan tempon, ne difektante ilian nutrovaloron. Tio donas rimarkinde altan ekonomian efikon. En la Tutlanda Ekspozicio pri Apliko de Nuklea Scienco kaj Tekniko, la radioprilaborita kolbaso de la Instituto pri Nuklea Aplikteknikо de provinco Siĉŭan estis bonvena al vizitantoj. Oni faris ankaŭ freŝeco-tenan esploron per surradiado al iuj ŝatataj kaj malfacile konserveblaj kaj transporteblaj fruktoj, kiaj Bajlan-melonoj, liĉioj kaj similaj. La kruciĝinte radioaktiva polietilena spongo farita de la Pekina Radiologia Centro, Ŝanhaja Scienca kaj Teknika Universitato kaj aliaj unuoj, estas ideala konstrua materialo varmtena, son-bara, kun bona meĥanika kvalito. Dum radiado oni ne uzas kemian medikamenton, kio ne kaŭzas polucion, kaj tiel la ekonomia kaj socia efikoj ambaŭ estas bonaj. Nun en la tuta lando pli kaj pli multaj ŝatas kulturi florojn, kaj ĉie en la stratoj kaj stratetoj estas floroj. Por fruigi la floradon de krizantemo, kiu floras en profunda aŭtuno, la Instituto pri Nuklea Aplikteknikо de provinco Siĉŭan faris multe da eksperimentoj pri surradiado al ĝi kaj florigis ĝin dufoje en unu jaro, la unuan fojon en junio kaj la duan en oktobro, kaj plie, okazis, ke pluraj floroj sidas sur sama pedunklo.

Ĉi-jare ekkonstruiĝis en provinco Ĝeĝjang la Ĉinŝan-a Nuklea Elektrejo kun totala kapacito de 300 000 kilovattoj, kiun Ĉinio mem projektis kaj starigos, kaj en provinco Gŭangdong la Dajaŭan-a Nuklea Elektrejo kun totala kapacito de 1.8 milionoj da kilovattoj, kiun administros kune Ĉinio kaj alia lando. Nuklea elektro estas pura kaj fidinda energio. Estas konate, ke Ĉinio estas riĉa je energiaj fontoj, tamen ili dislokiĝas ne simetrie, kaj en industrie evoluintaj regionoj la energio estas tre streĉa. En tiuj lokoj nepre necesas disvolvi nuklean elektron. La finkonstruo de tiuj du nukleaj elektrejoj multe mildigos la streĉecon de energio en industrie evoluintaj regionoj en orienta kaj suda Ĉinio. Post nelonge, en suda, orienta kaj nord-orienta Ĉinio konstruiĝos pli multaj nukleaj elektrejoj. En la jaro 2 000 la totala kapacito de nukleaj elektrejoj de Ĉinio atingos dek milionojn da kilovattoj. Kiel printempa tondro la ekkonstruo de la du nukleaj elektrejoj anoncas la venon de nova periodo de grandskala paca utiligo de nuklea energio kaj nuklea tekniko en Ĉinio.

** La aŭtoro estas vicĉefsekretario de la Ĉina Nuklea Asocio.*

ŜJAŬ ŜJŬEŜENG:

# Eduko servanta al kamparanoj

"ANTAŬE mi opiniis, ke agronomio ne estas lerninda, sed nun ĝi vekis en mi pli kaj pli grandan intereson. Ĉiufoje, kiam mi revenis al mia hejmvilaĝo por pasigi feriajn tagojn, la vilaĝanoj frekventis min kun salvo da demandoj pri agrikulturo kaj mi volonte konigis al ili la sciojn, kiujn mi lernis en la lernejo," memkontente diris al mi la 17-jara Ŭang Fangting. Li kaj liaj kamaradoj rakontis al mi pri novaj teknikoj de semobredado kaj kulturado de arakido, maizo k. a. Mi ne tute komprenis ilian parolon, sed mi estis kortuŝita de ilia korinklino al agrikulturo kaj hejmvilaĝo. Ili estas lernantoj de la Unua Agroteknika Mezlernejo de la gubernio Ĝjaŭnan de Ŝandong-provinco.

En la lastaj jaroj la gubernioj de la provinco fondis 362 agroteknikajn mezlernejojn kun pli ol 47 000 lernantoj.

Jam en la komenca periodo de la sesdekaj jaroj Ĉinio praktikis politikon samtempe disvolvi ordinaran edukadon kaj profesian edukadon. En 1965 pli ol 48% de la mezlernejanoj de la provinco Ŝandong vizitis profesiajn lernejojn. Sed poste, influate de la ultramaldekstra penso en la kultura revolucio, la provinco, same kiel aliaj lokoj, tro multigis ordinarajn superajn mezlernejojn, fermante preskaŭ ĉiujn profesiajn mezlernejojn. Rezulte de tio, en la meza periodo de la sepdekaj jaroj la profesiaj mezlernejoj konsistigis nur 1% de la totala nombro de la mezlernejoj. La mizera nombro de la profesiaj lernejoj kaŭzis motononecon de la strukturo de la mezgrada eduko en la kamparo.

"Tiam nia gubernio havis 25 superajn mezlernejojn, sed nur kvar elcentoj de iliaj diplomitoj povis eniri en superajn lernejojn kaj la plejparto devis reveni al sia hejmvilaĝo por okupiĝi pri

Lernantoj selektas en tritikkampo.





Veterinaro Ĉu Ljangĝje kuracas bovon de kamparano.

agrikulturo," diris kun bedaŭro s-ro Ŭang, estro de la Eduka Buroo de Ĝjaŭnan-gubernio. "Ili ne lernis fakajn sciojn, nek ricevis teknikan trejnadon, tial en la kamparo ili ne povis ludi sian rolon. Lastatempe raciiĝis la politiko por la kampara ekonomio kaj ĝeneraliĝis la respondeca sistemo de agrikultura produktado. La kamparanoj havas grandan labor-entuziasmon. Ili deziras altigi produktokvanton, kulturi arbojn kaj fruktoarbojn; cetere nia gubernio havas marbordon de pli ol 200 kilometroj, la kamparanoj deziras disvolvi bredadon de maraj estaĵoj, tial ili pli kaj pli bezonas multajn fakulojn. Sed en la pasinteco la ŝtato sendis al nia loko nur 130 teknikistojn diplomitajn el profesiaj mezlernejoj, kaj en nia gubernio ĉiu dekmilo da loĝantoj posedis maksimume du teknikistojn. Estas nepre necese reformi la strukturon de la mezgrada eduko kaj mem kulturi fakulojn."

Komence de 1980, laŭ la postuloj de la ŝtato kaj la provincaj instancoj, la gubernio komencis reformi la strukturon de la mezgrada eduko. La gubernio fondis du agroteknikajn mezlernejojn, dume ĝi reduktis la superajn mezlernejojn al ses, kaj kvar el ili starigis profesiajn kursojn de agronomio, forstokulturo, bredado de akvaj estaĵoj, brutobredado kaj bestokuracado, riparado de maŝinoj kaj elektraj aparatoj, konstruarto, pedagogio, financo kaj librotenado. En la kursoj lernas 550 gejunuloj. Same kiel la aliaj gubernioj de la provinco, Ĝjaŭnan, dum funkciigo de la ordinaraj superaj mezlernejoj, metis grandan atenton sur kulturadon de mezgradaj fakuloj por rapidigi sian moderniĝon.

La Unua Agroteknika Mezlernejo en la oriento de Ĝjaŭnan fondiĝis antaŭ du jaroj. Nun ĝi havas du trijarajn kursojn de agronomio kaj forstokulturo, kiujn vizitas 172 lernantoj en kvar grupoj. Post la someraj ferioj de tiu ĉi jaro la lernejo fondos kurson de brutobredado kaj bestokuracado kaj tiun de financo kaj librotenado. Ĝiaj lernantoj povas lerni lecionojn de ordinara supera mezlernejo kaj tiujn pri faka teorio, kiuj disponas po duonon de la lernohoroj. La gubernia registaro sendis al la lernejo instruistojn kun klereco de supera lernejo aŭ kun mezklasa teknika titolo. Cetere la registaro atribuis al la lernejo 55 hektarojn da agroj kiel ĝian eksperimentan kultivejon. La lernantoj sub la gvido de siaj instruistoj faris en la kultivejo eksperimenton pri specia komparo de tritiko, maizo kaj arakido, kio ne nur lernigis al ili iujn teknikojn kaj solidigis iliajn fakajn sciojn, sed ankaŭ liveris al la kultivejo bonspeciajn semojn taŭgajn por grandarea kulturado. Nun la kultivejo jam fondis bredejojn de kokoj, porkoj, ŝafoj kaj laktobovinoj kiel eksperimentejojn por la baldaŭ starigotaj kursoj de brutobredado kaj bestokuracado.

Bedaŭrinde, la lernejo finis neniun kurson. Por informiĝi pri la rolo de diplomitoj de agroteknika mezlernejo, mi veturis al la Unua Agroteknika Mezlernejo fondita en 1979, en Ĝjaŝjang-gubernio en la sudokcidenta parto de la provinco.

Antaŭ du jaroj, kiam la lernejo ankoraŭ ne diplomis siajn unuajn lernantojn, la najbara Jutaj-gubernio jam petis de ĝi tri el ili. Diplomito Ĝang Ĝaŭljang estis invitita de Dongŝin-subdistrikto kiel teknika direktanto por ĝiaj 200-hektaraj kotonkampoj. La kamparanoj de la loko unuafoje kulturis kotonon kaj estis senspertaj en tiu laboro. Utiligante siajn sciojn,



Lernantoj de agroteknika mezlernejo

Ĝang Ĝaŭljang preparis facile kompreneblajn materialojn de pli ol centmil ideogramoj por propagandi ilin en fadena disaŭdigo, en kadraj kunvenoj kaj en foiroj. Krome li ofte iris al kotonkampoj por doni konsilojn. Dank' al li la meznombra hektara produktokvanto de kotono atingis 975 kg., malgraŭ malfavoraj kondiĉoj de klimato. Pro sia diligenta laboro li ricevis laŭdojn de la kamparanoj. Kiam mi vidis Ĝang Ĝaŭljang, li jam revenis al sia subdistrikto kaj laboris kiel ĝia teknikisto. Li estis faranta sisteman diskonigadon de novaj agrikulturaj teknikoj kaj fondis trejnajn kursojn por pli ol 800 kadroj kaj kamparanoj.

El la 131 diplomitoj de la lernejo (por du fojoj) 18 eniris en superajn lernejojn. La ceteraj fariĝis guberniaj aŭ subdistriktaj teknikistoj aŭ instruistoj de kamparana teknika lernejo aŭ laboris kiel veterinaro. Ĉu Ljangĝje, Ĝjang Ŝanŝjŭe kaj iu alia memvole restis en la bestokuracejo de la lernejo. Ili senĉese altigas la nivelon de sia tekniko, fervore servas al la kamparanoj postulante nur malmultan rekompencon. Pro tio la kamparanoj de la naŭ ĉirkaŭaj subdistriktoj petas ilin kuraci iliajn brutojn, eĉ preferante longan piediradon. En la somero de la pasinta jaro epidemio atakis la lokon kaj ĉiutage dekoj da tirbovoj atendis kuracadon en la bestokuracejo. Helpate de sia instruisto, Ĉu Ljangĝje analizis la simptomojn de iliaj malsanoj kaj pretigis recepton tre efikan, sed malkaran. Li rapide resanigis ĉiujn bovojn (ĉ. mil). Li peneme laboradis pli ol unu monaton kaj malpeziĝis je 5.5 kg. Mi laŭdis lian faron, sed li modeste diris: "Mi estas filo de kamparano, kaj mi bone scias, ke bovo estas tre valora por kamparanoj." Ĝuste pro tio la kamparanoj kare nomas la agroteknikan lernejon "nia lernejo".



Lernantoj analizas acidecon kaj alkalecon de grundo.

Fotoj de
**ĜOŬ DONGJŬAN**

## 500-KILOVOLTA LINEO

Unu el la grandaj konstruoj de Ĉinio estas 500-kilovolta lineo inter la urbo Datong de Ŝanŝji-provinco kaj Fangŝan-gubernio de Pekino. La lineo longas je 285.7 km. En la 30-a de junio ĉi-jare oni komencis transsendon de elektro per tiu lineo. Ĝia nuna kapablo superas 100 000 kW.


La lineo ludas gravan rolon por kovri la evidentan mankon de elektro en la ĉefurbo kaj la regiono de Pekino, Tjanĝin kaj Tangŝan.

## LA UNUA-OJ EN LA KONSTRUADO DE FERVOJAJ PONTOJ

Unu el la gravaj konstruoj en Ĉinio estas la fervoja.

Ĉi-jare konstruiĝas 4 fervojaj pontoj, kiuj okupas la plejecon respektive de sia speco:

La plej longa ponto en Ĉinio — Ŝinŝjang-Heze-a Fervoja Pontego super la Flava Rivero. La pontego longos je 10 282 m.




Oni konstruas Ĉangdong-pontegon sur la Ŝinŝjang-Heze-a Fervojo super la Flava Rivero.

La plej larĝspana ponto el antaŭstreĉitaj armaturitaj traboj — la Maŭling-rivera pontego de la Nanning-Fangĉeng-a Fervojo. La spano larĝas je 80 m.

La unua duetaĝa ŝose-fervoja ponto kun la vojoj por senmotoraj veturiloj ambaŭflanke de la malsupra-etaĝa fervojo — Ŝjiĝjang-pontego de la Sanŝuj-Maŭming-a Fervojo. Senmotoraj veturiloj ne bezonos veturi supren kaj malsupren. Tio multe oportunos al la popolanoj de tiu regiono, kie multas senmotoraj veturiloj.

La unua ponto kun paralelaj fervojo kaj ŝoseo sur la samaj pilieroj — Bejĝjang-pontego de la Sanŝuj-Maŭming-a Fervojo Tia ponto povos trapasigi aŭtojn pli rapide.

Elektra lineo de 500 kilovoltoj





Sceno el la rakonta filmo "Kamparaj Geedzoj", la plej elstara rakonta filmo ricevinta premion "Ora Koko"

## MEMPAGA TURISMO DE KAMPARANOJ AL JAPANIO

La 29-an de junio, turista grupo el 50 kamparanoj de Hebej-provinco veturis de Pekino al Japanio por fari turisman vojaĝon per mempago. Tio estas la unua tiuspeca turista aktivado en Ĉinio.

Ĉiu el la grupo estas kamparano, riĉiĝinta per sia diligenta laboro. Inter ili 40 sin okupas pri konstruado, transportado, bredado, tanado ktp, kaj 10 reprezentas ekonomiajn kombinatojn. La plej maljuna estas 57-jara kaj la plej juna, 24-jara.

## FILMA PREMIO EN ĈINIO

La 2-an de junio okazis en Ĝjinan, la ĉefurbo de Ŝandong-provinco, premia kunveno de la 4-a Or-koka Premio de la Ĉina Filmista Asocio kaj la 7-a Cent-flora Premio de la gazeto "Daĝong Djanjing".

Famaj filmaktoro Jang Zaj-baŭ kaj aktorino Gong Sjŭe gajnis respektive la premion de la ĉefrolulo kaj tiun de la ĉefrolulino de Orkoko kaj Cent Floroj.


En 1983 Ĉinio produktis 127 rakontajn filmojn kaj grandan nombron da filmoj sciencpopularigaj, dokumentaj, pentritaj ktp, kaj la produktokvanto estas la plej granda kompare kun tiu en la pasintaj jaroj de post la fondiĝo de la nova Ĉinio. La premiitaj filmoj montris, ke la realismaj, precipe filmoj kun loka koloro kaj nacieca gusto, ricevis varman aprobon de la spektantoj.

## NOVA METODO POR REKREI PERDITAN FINGRON

Kirurgoj Ju Ĝonggĝja kaj He Hegaŭ de la 6-a Popola Hospitalo de Ŝanhajo kreis novan metodon por rekrei tute perdita(j)n fingro(j)n. Laŭ tiu metodo la rekreita fingro estas multe pli lerta kaj pli bela ol tiu farita laŭ la malnova metodo.


Laŭ la nova metodo, oni plantu pecon da ilio sur la lokon de perdita polekso kiel fingran oston, detranĉu la ungon kaj haŭton de la halukso (kune kun la dua aŭ la 2-a kaj 3-a piedfingroj de la paciento, tegu la plantitan fingro-oston por formi novan polekson, kaj fiksu la 2-an (aŭ la 2-an kaj 3-an) piedfingron sur la loko de montra (aŭ la montra kaj la longa) fingro, por ke la nova haŭto formu la spacon inter la montra fingro kaj la dikfingro.

Jam tri pacientoj, kies fingroj perdiĝis kaj rekreiĝis laŭ la nova metodo, reakiris la funkcion de sia mano.



La refaritaj fingroj de Ĝaŭ Hajŝeng

Jue Ĝonggĝja (la meza) kaj He Hegaŭ (la dekstra) kontrolas la funkciojn de la fingroj de Ĝaŭ Hajŝeng. La fingroj de ties dekstra mano perdiĝis en labor-akcidento. Refarite de la kirurgoj per nova metodo, nun liaj dikfingro, montrofingro kaj mezfingro bone funkcias.



LU ĈUANBJAŬ:

# Ŝenĝen — Malfermita Fenestro

KIEL konate, por veturi de Hongkongo al aliaj lokoj de Ĉinio oni nepre devas trairi la urbon Ŝenĝen.

De longa tempo ĝin trairis ĉiutage homoj kun malsamaj ŝtatanecoj kaj haŭtkoloroj, tamen neniu el ili volis iom haltigi siajn hastemajn paŝojn. La kialo estas tre simpla. Tie estis nek "plezura paradizo" sopirata de turistoj, nek foiro alloganta komercistojn.

Neatendite, iu raporto el ĉina doganejo de tiu urbo diris, ke inter la pli ol 8 milionoj da transirintoj de Lŭohu-ponto en 1983, sufiĉe multaj celis esplori la investo-akceptan medion, trakti negocon, fondi fabrikon, kunlabore konstrui oficdomon, loĝdomon, feriejon kaj vilaon, aliaj fari turisman vojaĝon por ĝui ĉarmajn pejzaĝojn ĉe la Suda Ĉina Maro, kaj triaj veni al landinterno por vizito, studo aŭ traktado pri kuna funkciigo de entreprenoj.

Kio okazis al Ŝenĝen? Kial ĝi fariĝis tiel alloga? En marto kaj aprilo ĉi-jare mi vizitis ĝin kaj plivastigis mian vidkampon antaŭ multaj faktoj.

## LA PLEJ GRANDA SPECIALA EKONOMIA DISTRIKTO


"Ŝenĝen ŝanĝiĝis ekde la stariĝo de sia speciala ekonomia distrikto," konigis al mi s-ro Li Zuj-u en sia vasta oficejo. Li estis unu el la plej fruaj konstruantoj de la speciala distrikto kaj nun respondeculo de reformada oficejo sub la popola registaro de Ŝenĝen.

Kiel konate, li diris, Ĉinio kun postiĝintaj ekonomio kaj tekniko klopodas por moderna konstruado. En tiu situacio tre necesas aktive disvolvi ekonomian kunlaboron kaj teknikan interŝanĝon kun aliaj landoj por enkonduki iliajn investon, avangardajn teknikon, instalaĵon kaj metodojn de administrado. Pro tio, de la lastaj jaroj la ĉina registaro praktikas malferman politikon al fremdaj landoj, kaj en 1980 decidis starigi specialajn ekonomiajn distriktojn en difinitaj kvartaloj de la urboj Ŝenĝen, Ĝuhaj, Ŝantoŭ kaj Ŝjamen ĉe la sudorienta marbordo.

Ŝenĝen estas la plej granda el tiuj kvar distriktoj. Ĝi estas en mallarĝa zono kun areo de 327.5 kvadrataj kilometroj. Tie estas facilaj trafikoj akva, tera kaj aera al landinterno kaj al aliaj landoj pere de Hongkongo. La klimato estas modera, pejzaĝo ĉarma. Ĉio ĉi tio estas aparte favoraj kondiĉoj naturdotitaj por la speciala ekonomia distrikto.

Doko de Ŝekoŭ





La aluminia fabriko Hŭaji starigita per kuna investado de ĉina kaj alilanda kapitaloj

En Ŝenĝen oni praktikas specifajn politikojn malsamajn ol en la aliaj lokoj de la lando. Ekzemple la investantoj estas favorataj en iuj flankoj. Tie la procento de laŭenspeza imposto estas nur 15%, dum tiu en la aliaj lokoj de la lando pli ol 30%; la terimposto estas malmulta; ĉiuj importitaj maŝinoj, krudmaterialoj kaj transportiloj necesaj por entreprenoj starigitaj per fremdlanda kapitalo estas senlimimpostaj. Cetere la salajro de la tieaj laboruloj estas malpli alta ol tiu en Hongkongo je pli ol 40%.

Li Zuj-u diris, ke krom la supre menciitaj kondiĉoj kaj rimedoj, Ŝenĝen havas ankaŭ aliajn avantaĝojn, tio estas la ekspluato de petrolkampo en la Suda Ĉina Maro okcidente de ĝi, la finkonstruo de nuklea elektrejo ĉe Daja-golfo oriente de ĝi kaj la rapida konstruado de diversaj fundamentaj establaĵoj per kolektita kapitalo, prunteprenita mono, investo de kune administrataj entreprenoj de aliaj lokoj de la lando kaj enkondukita fremdlanda kapitalo. Dank' al ĉio ĉi tio, Ŝenĝen fariĝis bona medio por akcepti investon en mallonga tempo kaj efike altiris al si fremdlandan kapitalon.

Mi petis lian opinion pri la iam cirkulinta diro, ke la ĉina speciala ekonomia distrikto estas tute sama kiel libera haveno kaj prilabora distrikto de eksportaĵoj de iuj landoj.

"Tio estas miskompreno," li klarigis per vortoj de sinjoro Ljang Ŝjang, urbestro de Ŝenĝen, "la speciala ekonomia distrikto de Ŝenĝen estas komunumo de pluraj kunekzistantaj ekonomiaj elementoj sub la gvido de socialisma ekonomio. Troviĝas sameco inter ĝi kaj la aliaj lokoj de la lando, nome ĝi havas ekonomiojn ŝtatan, kolektivan kaj individuan, kaj ankaŭ malsameco, nome ĝi havas ŝtatkapitalisman ekonomion gvidatan de socialisma ekonomio. Tial strukture ĝi ne identiĝas kun libera haveno kaj prilabora distrikto kaj ankaŭ diferencas de la aliaj lokoj de la lando.

## EFIKO SIGNIFAS VIVON

Ĉiuj vizitantoj al la industria kvartalo Ŝekoŭ de Ŝenĝen povas vidi, ke ĉe vojo apud la kvartala oficdomego staras slogantabulo kun okulfrapaj vortoj: "Tempo signifas monon, kaj efiko vivon!" Ĝi enkorpigis la strebemon de Ŝenĝen-anoj alte taksi tempon kaj efikon. Tiu spirito manifestiĝis en la laboroj de ĉiuj entreprenoj de Ŝenĝen, precipe la tiea fundamenta konstruado kun granda rapideco kaj bona kvalito estas rekonata de ĉinaj arkitektoj kaj fremdlandaj komercistoj.

Antaŭe Ŝenĝen estis postiĝinta en urbokonstruado. Ĝia malnova urbo okupis nur tri kvadratajn kilometrojn, kun mallarĝaj stratoj, sola kvinetaĝa domo kaj neniu neonlampo.

Post kiam Ŝenĝen estis difinita kiel speciala ekonomia distrikto en 1980, la konstruaj investo kaj areo pluroble kreskis kun ĉiu jaro. Ĝis la fino de 1983 oni investis 2.03 miliardojn da jŭanoj por konstrui stratojn kaj domojn kun areo de 7.98 milionoj da kvadrataj metroj kaj jam plenumis 45%. El ili estas 51 trunkaj stratoj, kiuj formis trafikan reton, kaj finkonstruiĝis loĝdomoj kun areo de 2.11 milionoj da kvadrataj metroj. Aperis pli ol 250 fabrikoj, kies plejparto jam ekfunkciis. El la konstruata areo pli ol 500 000 kvadrataj metroj estas destinitaj por kulturaj aferoj, provizo de elektro kaj akvo, telekomunikado kaj turismo.

La rapida kaj bonkvalita konstruado de Ŝenĝen rezultis el tio, ke la instanco ĉesis disigi administrajn rajtojn de fundamenta konstruado, koncentris la kapitalon, fondis specialan gvi-

dan organon por unuigi planon, ter-rekvizicion, projektadon, konstruadon kaj administradon kaj tiamaniere evitis malŝparon de laborforto, mono, materialo kaj tempo. Samtempe kun tio la instanco reformis la organizadon kaj administradon de la konstrua laboro kaj turnis la administracian difinon de fundamentkonstrua tasko en respondecan sistemon proponi aŭ akcepti laboron laŭ kontrakto. Por sukcesi en akcepto de propono, multaj konstruaj entreprenoj praktikas ekonomian respondecan sistemon favoran al levo de entuziasmo de konstruantoj kaj kuraĝe enoficigis junajn inĝenierojn kaj teknikistojn nekonservativajn. Ĝuste tiel oni konstruis kvindek-etaĝan domegon por internacia komerco, la plej altan en nia lando. Iutage mi intervjuis Lŭo Ĝjundong, 29-jaran vicĉefdirektanton de tiu laboro. Dank' al lia nova teknologio de armaturado oni konstruis ĉiun etaĝon kun areo de 1 300 kvadrataj metroj meznombre en tri tagoj. Tiu avangarda nivelo surprizis la ĉinajn arkitektojn kaj fremdlandajn komercistojn.


## FRUKTODONA KUNLABORO

Ŝenĝen-anoj diris, ke pasintece la vizitantoj trovis nenion vidindan, sed nun ili eĉ ne scias kien direkti la rigardon.

Tio estas vera. La arbare starantaj domegoj kaj abundaj varoj en komerca kvartalo de Lŭohu blindigas iliajn okulojn kaj ĉarmaj pejzaĝoj en turismaj vilaĝoj forgesigas al ili forveturon. Sed min plej profunde impresas la komputera balaa kontrolilo, kiu povas liveri fidindan bazon por diagnozi krania-cerbajn malsanojn, la mikroonda komunika instalaĵo en Ŝekoŭ, kiu povas servi al laborantoj de diversaj kompanioj kaj entreprenoj kaj fremdlandaj komercistoj per rapida kaj ĝusta komerca kontakto, la kontinua fandmaŝino de ŝtala fabriko, la aŭtomata striiga maŝino por prilabori aluminion, la ŝtonhaka maŝino por konstruado kaj la aŭtomata melkomaŝino por brutobredado, kiuj povas altigi produktivecon kelk-, dekkelk- kaj eĉ kelkdek-oble.

En Ŝenĝen estas pli ol dekmil kompletoj da avangardaj maŝinoj, kiuj apartenas al entreprenoj konstruitaj per fremdlanda investo aŭ kune administrataj de Ĉinio kaj alia lando. De 1980 ĝis la fino de 1983, en Ŝenĝen oni jam subskribis pli ol dumil diversajn interkonsentojn kun fremdlandaj komercistoj por investi pli ol 1.5 miliardojn da usonaj dolaroj, el kiuj pli ol kvarcent milionoj jam estis disponitaj. En la unua duono de la kuranta jaro la sumo multe superis tiun de la sama periodo pasintjara. Krom daŭra multiĝo de Hongkonga investo, grandmezure leviĝis ankaŭ investoj de Usono, Japanio, Britio kaj FR Germanio. Oni asignis tiun sumon grandparte al komputero, altklasa konstrua materialo — interne malplena vitro, galvaniza

Labor-linio de diktafonoj de la elektronika limigita kompanio Baŭhŭa





Bazaro sur Ĝongjing-strato, Ŝatoûĝjaŭ-urbeto

aldonaĵo, dekmil tutciferaj komputeraj telefonoj kaj tiel plu. Ili estas avangardaj en la mondo kaj vaste uzataj en Ĉinio.

### ŜENĜEN-ANOJ

La atingo de Ŝenĝen estas nedisigebla de la klopodo de ĝiaj konstruantoj. Ŝenĝen-anoj estas viglaj, nekonservativaj, laboremaj, lernemaj kaj lertaj en administrado.

Mi konatiĝis kun direktoro Ĝoŭ Songnjan, supera inĝeniero pri aluminia prilaboro. Li famiĝis pro elstara administrado nur unu jaron post kiam li ekfunkciis kiel direktoro de la aluminia fabriko Hŭaji (limigita kompanio) en Ŝenĝen.

Antaŭe tiu fabriko sin trovis en ĥaoso, kun malgranda produktokvanto, malbona kvalito kaj multaj rifuzitaj produktaĵoj. Kiam Ĝoŭ enoficiĝis kiel direktoro, li vizitis alilokajn entreprenojn kaj lernis administran sperton de aliaj landoj kaj profunde studis la problemojn de la fabriko. Li trovis, ke la ĉefa problemo konsistas en tio, ke la estroj ne konas produktadon nek administradon. Li decideme invitis ok homojn el aliaj lokoj lertajn en teknologio, produktado kaj administrado, metis ilin sur gravajn postenojn kaj kune kun ili plibonigis teknologion kaj produktadon, solvis la problemon ke aluminiaĵoj enhavas skorion aŭ vezikon, kaj tiel altigis la kvaliton de produktaĵoj. Li abolis ĉiujn neraciajn regulojn kaj ekscitis la aktivecon de oficistoj kaj laboristoj. Nun tiu negranda fabriko povas produkti 600 tunojn da aluminiaĵoj ĉiumonate, kaj ĝia produktokvanto atingis la plej altan normon de Ĉinio.

Ĝoŭ Songnjan diris, ke kiel direktoro de limigita kompanio en speciala distrikto li direktas sian atenton kaj klopodon unue al senĉesa altigo de produktivo kaj kreo de pli da produktovaloro kaj due al apliko de la enkondukitaj avangardaj tekniko kaj administra metodo kaj serĉo de sperto utila al la enlanda moderna konstruado.

Pri kio do zorgas la junuloj de la speciala distrikto? Ĝoŭ Ĉjanĉeng, estro de la elektrona fabriko Ajhŭa, diris al mi, ke el liaj laboristoj multaj estas junuloj, kiuj antaŭ nelonge finis sian lernejan studon kaj neniam kontaktiĝis kun moderna produktado. Li iam timis, ke ili ne estus disciplinemaj. Sed ili laboris energie, lernis diligente kaj baldaŭ fariĝis lertaj laboristoj. Li konigis al mi ilian junan talentulon Ĝang Ĝjanghŭa, kiu ne nur diligente studas elektronikon, sed ankaŭ persiste lernas Esperanton matene kaj vespere. Li jam finis studon de la Esperanta Koresponda Kurso kaj akiris diplomon. Mi donacis al li novan numeron de "El Popola Ĉinio" kaj varme gratulis lin pro lia bona sukceso en lernado kaj laboro.

Mi jam forlasis Ŝenĝen, tamen la viglaj figuroj de Ŝenĝen-anoj profunde gravuriĝis en mia memoro.



Ŝenĝen en konstruado





Sur strato de Ŝenĝen



Parto de la industria kvartalo Ŝekoŭ

Amuzejo



Novaj domoj



# Pekina Akademio de Pentrartoj

de **LI PING**



Ruĝa lilio
Pentrita de **PENG PEJĈJŬAN**

Sur altebenaĵo
Pentrita de **ĜOŬ SICONG**





Pejzaĝo de Ŝennonggĝja Pentrita de **ĜANG BU**

LA Pekina Akademio de Pentrartoj antaŭe nomiĝis Akademio de Ĉinaj Pentrartoj, kiu fondiĝis en majo 1957. Ĝi estas la unua akademio de pentrartoj starigita post la naskiĝo de la nova Ĉinio. Ĉji Bajŝi, la forpasinta majstro de la ĉin-stila pentrarto kaj mondfama kultura persono, estis ĝia honora prezidanto kaj Je Gongĉŭo, fama kaligrafo, pentristo, pentraĵ-aprezisto kaj pentraĵ-kolektisto, estis ĝia prezidanto.

Pekino estis loko kie kolektiĝis famaj pentristoj en la historio. Jam en la periodo de la Kvin Dinastioj (907-960 p. K.) aperis en Ĉinio simila institucio de pentrartoj. Dum la pasintaj pli ol mil jaroj ĝi ĉiam estis la plej supera organizaĵo de la pentristoj por studado kaj verkado, kaj ludis gravan rolon por heredi kaj disvolvi la bonan tradicion de la ĉin-stila pentrarto.

En 1965 la akademio akceptis nombron da olepentristoj, lignogravuristoj kaj skulptistoj. Ekde tiam ĝi fariĝis organizaĵo de pluraj artoj kaj prenis la nunan nomon. Ĝi havas fakojn olepentran, lignogravuran, skulptan kaj freskan kaj tiujn de ĉin-stilaj pentraĵoj homfigura, pejzaĝa kaj birda-flora. La akademio havas artan komitaton elektitan de la pentristoj.

La membroj de la akademio ofte vizitas fabrikojn, vilaĝojn, famajn pitoreskejojn kaj lokojn de nacimalplimultoj por fari desegnojn. Iliaj verkoj plejparte estis montritaj en la landaj kaj pekinaj ekspozicioj kaj plurfoje premiitaj. En la lastaj jaroj ili ofte vizitis aliajn landojn kaj tie okazigis ekspozicion. En 1981 ili okazigis en Kanado ekspozicion de ĉin-stilaj pentraĵoj kaj en 1982, kiam Ĉinio kaj Japanio celebris la 10-an datrevenon de restariĝo de la diplomatiaj interrilatoj, la Pekina Akademio de Pentrartoj kaj la Japana Suda Akademio de Pentrartoj okazigis ekspozicion respektive en Ĉinio kaj Japanio, kio akcelis la amikecon inter la du popoloj.

La akademio kompilis kaj eldonis plurajn gazetojn, librojn kaj pentraĵ-albumojn, sisteme resumis la tradiciajn pentrartojn kaj teorion de veteranaj pentristoj, kio multe kontribuis al la disvolvo de la ĉin-stila pentrarto.

La akademio situas en klasikstila korto de la urba centro de Pekino. Tie la medio estas kvieta kaj akre kontrastas kun la urba bruego, verdaj bambuoj susuras en venteto. Respondeculo de ĝia arta sekcio diris al mi ke pro disvolviĝo de la akademio ne sufiĉas la nunaj pentrejoj. Antaŭ nelonge la akade-

En la ekspoziciejo Jin Ŝoŭŝi (la unua de dekstre), vicprezidanto de la Pekina Akademio de Pentrartoj, interparolas kun Kono Akimura, prezidanto de la Japana Suda Akademio de Pentrartoj.





Pentristinoj Dong Ŝupin (la dekstra) kaj Ĝoŭ Sicong (la meza)

mio finkonstruis modernan konstruaĵaron en antaŭurbo de Pekino inkluzive de pentrejoj, eksponejoj kaj loĝdomoj. Post nelonge la pentristoj laboros en vastaj kaj komfortaj ĉambroj.

Ŭang Ŝjŭetaŭ, forpasinta antaŭ du jaroj, estis prezidanto de la akademio. Li estis fama pentristo pri floroj kaj birdoj. Jam en sia juna aĝo li jam komencis pentri laŭ sia devizo "ne por vanta famo, sed por prezenti la realan vivon". En sia kelkdekjara artista vivo li formis sian apartan stilon senĝenan kaj delikatan. En 1953 li, per sia verko "Ambirdoj ĉe Fragmit-lago", gajnis la unuan premion en la Unua Tutlanda Ekspozicio de Belartaĵoj. En la aĝo de 80 jaroj li ankoraŭ pentris. Li diris plurfoje: "Mi metas mian esperon sur la junajn kaj mezaĝajn pentristojn."

Vere, la junaj kaj mezaĝaj pentristoj jam fariĝis ĉefaj fortoj de la nuna akademio.

La 45-jara Ĝoŭ Sicong estas fama pentristino. Nun ŝi estas vicprezidanto de la Pekina Filio sub la Ĉina Belartista Asocio. Profunde influate de germana ksilografo Käthe Kollwitz kaj japana pentristino Akamatsu Toshiko, ŝi ĉiam persistas en la arta strebado, neniam ĉasas honoron kaj profiton. Antaŭ kelkaj jaroj ŝi kaj ŝia edzo Lu Ĉen komencis kune verki grandan bildserion "Karbministoj", kiu tute malsamas al ŝia originala stilo. Ŝi diris, ke oni ne devas blinde iri laŭ alies piedpaŝoj nek laŭ la siaj. Arta ripetado signifas malsukceson.

Juna pentristo Ŭang Mingming, kiu eklernis pentradon de sia kvinjara aĝo kaj dufoje gajnis premion en internaciaj konkursoj de la infanaj pentraĵoj en knaba aĝo, nun jam edziĝis kaj havas infanon. Ekde sia infaneco li diligente faris kopiadon de ĉinaj antikvaj pentraĵoj, tial kompare kun siaj samaĝaj kolegoj li havas pli profundan bazon kaj pli altan nivelon en la pentrarto. En la lastaj du jaroj li ekinteresiĝis pri la historiaj temoj. Nun li provas prezenti historiajn personojn per la tradicia ĉina pentrarto kaj precipe ilian spiritan mondon.

La Pekina Akademio de Pentrartoj aĝas jam 27 jarojn. Tamen, kompare kun la longa historio de la ĉin-stila pentrarto, ĝi estas tre juna. Nun ĝi estas ĝuste en sia bela florado.

# Ĉinaj Luktartoj


"BASTONO svingiĝas ciklone, lanco moviĝas serpente, glavo hakas fulmrapide kaj pugno batas pluvege." Per tiuj vortoj oni vivece priskribas la ĉinajn luktartojn kaj esprimas sian varman laŭdon al ili.

Luktarto estas sporto plej vaste cirkulanta inter la ĉinaj popolanoj kaj rimedo hardi la temperamenton kaj sindefendi. Ĝi, kun longa historio kaj aparta stilo, estas enhavoriĉa kaj multspeca. En la landskala luktarta kunveno oni ludis kaj konkursis pri pli ol 500 specoj de luktartoj. La luktartoj, kiuj havas grandan efikecon en atako kaj defendo estas oficiale listigitaj en konkurso. Ankaŭ la mirinda *ĉigong*-o estis prezentita en la kunveno.

La ĉinaj luktartoj estas resumo de la spertoj kaj artoj pri atako kaj defendo iom post iom akumulitaj de la ĉina nacio en la porviva batalo. Jam antaŭ 4 000-5 000 jaroj aperis en nia lando luktarto. En sia longtempa disvolviĝo la ĉinaj luktartoj formis diversajn skolojn, ĉ. cent specojn, dekojn da lukt-instrumentoj kaj ekstreme elstarajn seriojn da luktmovoj. La nunaj ĉinaj luktartoj povas esti dividitaj en kvin kategoriojn: ĉina boksarto, armila lukto, durivala lukto, grupa prezento kaj atakdefenda lukto. La ĉina boksarto estas plej varia enhave, krom la famaj skoloj Ŝaŭlin, suda ĉina boksarto kaj *tajĝiĉŭan*, ankoraŭ estas multe da aliaj ĉinaj boksartoj kun originala stilo, kiuj estas imititaj de la bestaj movoj, ekz., de simio kaj aglo kaj aliaj, kiuj distingiĝas per gracieco kaj forta atakkapablo.

Ludo per glavo





Boksarto Jinggâŭ

estas la plej fama en armila lukto.


La ĉinaj luktartoj formis en sia disvolviĝo ĉiu siajn regionajn karakterizaĵojn. La suda boksarto estas ĝenerala nomo de la boksartoj cirkulantaj en diversaj lokoj de suda Ĉinio kaj havas historion de pli ol 500 jaroj. Inter la ĉinaj luktartistaj rondoj cirkulas onidiro "suda boksarto kaj norda piedlukto — pleja teruro". La suda boksarto kun manmovoj kiel la ĉefa, postulas, ke la praktikanto "ŝanĝu plurfoje manmovojn en unu paŝo". Ĝi postulas ke la piedaj movoj estu stabilaj, movdistancoj mallongaj, movampleksoj malgrandaj kaj la gravito malalta. Ĝi postulas ankaŭ, ke la movoj rapidaj kaj malrapidaj estu alternaj ritme.

*Tajĝiĉŭan* estas alia grava arta skolo de boksarto. Ĝi ne emfazas aktivan atakon, sed postulas venkon super forta rivalo

La luktaj armiloj estas diversaspecaj, ili originas ĉefe el antikva armilaro. Ĝi konsistas el longaj armiloj, kiaj bastono, lanco kaj glavego; mallongaj armiloj, kiaj glavo, spado, kaj hoko; kaj faldeblaj armiloj, kiaj naŭsekcia vipo, trisekcia bastono kaj ŝnurita martelparo.

La luktarto de la skolo Ŝaŭlin kreita en la 5-a jc. havas la plej kompletan sistemon, plej gracian movserion kaj plej vastan cirkuladon el ĉiuj luktartoj. Ĝi entenas pli ol 40 luktospecojn kaj dekkelkajn armilojn. Ĝi karakteriziĝas per majstra lerteco kaj postulas, ke la movo estu rapida kiel fulmo, la turniĝo kiel rado kaj la staro estu firma kiel monto. Ĝiaj movoj estas variaj kaj grandampleksaj kaj ĝiaj atako kaj defendo estas uzataj pli strikte. La bastona luktarto


Boksarto Tajĝiĉŭan



per "molaj" movoj kaj atako estu farata la dua. *Tajĝiĉŭan*-praktikanto en lukto lerte delogas la rivalon de la atakdirekto, evitas lian fortaĵon kaj kaptas lian malfortaĵon por venki lin. Ĝi karakteriziĝas per forteco en mildaj movoj ŝajne malfortaj. (Bv. legi la artikolon "*Tajĝiĉŭan* trans Landlimon" en la n-ro 8, de nia revuo ĉi-jare.)

*Ĉigong*-o estas rigardata kiel orienta miraklo. *Ĉigong*-majstro Hoŭ Ŝujing povas fraprompi ŝtonplaton 6 cm. dikan per manplato kaj ŝtonplatojn 10 cm. dikan kaj 12 cm. dikan per la kapo kaj piedo respektive. Krome, kiam li kuŝas surdorse, oni povas meti sur liajn bruston kaj ventron mil-kilograman betonplaton, dume li estas neniom vundita.

Spado estas unu el la ĉinaj luktaj armiloj kun longa historio, tial ĝi estas nomata reĝino de la armiloj. La ĉefaj skoloj de ĉinaj luktartoj ĉiu havas sian spadan luktarton, ekz., tiu de Ŝaŭlin, Udang kaj aliaj. La diversaj skoloj de spadaj luktartoj ĉiu havas sian fortan punkton, sed ili ĉiuj alte taksas plenan akordiĝon de la rigardo, movoj de la manoj, korpo kaj spado. La nunaj spadaj luktartoj povas esti uzataj por memdefendo kaj iliaj liberaj kaj fluaj movoj havas pli da arta valoro.



Ludo per du hokoj

En miloj da jaroj la ĉina popolo prenis luktartan ekzercadon kiel rimedon korpsanigan, malsanoforigan, vivlongigan kaj temperamenthardan. Tiuflanke *ĉigong*-o kaj *tajĝiĉŭan* ludas plej grandan rolon. La teorio de *ĉigong*-o kaj *tajĝiĉŭan* havas intiman rilaton kun tiu de la ĉina medicino. Suferantoj de multaj kronikaj malsanoj, kontraŭ kiuj eĉ kuracistoj ne havas efikan rimedon, povas akiri mirindan kuracan efikon per ekzercado de *ĉigong*-o kaj *tajĝiĉŭan*.

Ĉar la luktarta sporto konvenas al ĉiuj homoj ĉu junaj ĉu maljunaj, tial multaj homoj sin ekzercas per luktarto ĉu en la urboj ĉu en la kamparo. Multaj lernejoj en Ĉinio prenas luktarton kiel parton de sia fizikkultura leciono.

En la lastaj jaroj aperis granda nombro da junaj eminentaj luktartistoj en Ĉinio. Inter ili estas Li Ljanĝje de Pekino, kiu ludis la ĉefrolon en la filmo "La templo Ŝaŭlin", Hu Ĝjanĉjang de Ĝeĝjang-provinco, kiu plurfoje gajnis ĉampionecon de vira kunmetita konkurso en tutlanda luktarta konkurso, Ĝaŭ Ĉangĝjun de Ŝanŝji-provinco, kiu gajnis tri ĉampionecojn en unu konkurso, Haŭ Ĝihŭa de Pekino, kiu trifoje sinsekve gajnis ĉampionecon de virina kunmetita konkurso. Ili estas novaj eminentaj reprezentantoj de la ĉinaj luktartistoj. Ili heredis la ĉinajn luktartojn kaj klopodas por ĝia nova prosperiĝo.


# Mi kaj gastronomio

de ŬANG JIĜJUN

*En la fino de 1983 okazis en Pekino kuirarta konkurso de famaj ĉinaj majstroj-kuiristoj. La aŭtoro partoprenis en la konkurso kaj gajnis titolon de plej bona kuiristo kaj premion pro sia eminenta teknologio de malvarma plado, tiel ke li fariĝis okulfrapa persono duoble honorita en la konkurso. Li lernis bonan sperton de aliaj kaj senĉese klopodis por perfektigi sian kuirarton. Li estas majstro-kuiristo pri pladoj de Ŝandong-provinco.* — LA RED.

Jam kvardek jarojn mi min okupis je kulinara laboro. Vere, la tereno por kuirado estas iom malvasta, tamen mi opinias, ke ankaŭ tie oni povas disvolvi sian talenton same kiel aliloke, ĉar la karakterizaj tradiciaj pladoj de Ĉinio postulas multajn sciojn kaj kapablojn. Ĝuste sur tiu malgranda tereno mi ellernis la kuirarton de la Ŝandong-aj pladoj, unu el la ok famaj ĉinaj gastronomiaj sistemoj. Ĉiufoje, kiam mi faris bongustajn pladojn kaj rimarkis, ke oni prenas la manĝadon kiel plezuron kaj ĝuon, mi forte sentis fierecon pro mia signifoplena laboro.

Ŭang Jiĝjun preparas pladon.



Mi naskiĝis en malriĉa familio en Ŝandong-provinco, orienta Ĉinio. En la 12-jara aĝo mi venis al Pekino spite longan vojaĝon kaj fariĝis lernoknabo en Fengzejŭan-restoracio en tiu urbo. Ĉiutage, antaŭ la tagiĝo mi jam ellitiĝis por balai la korton, viŝi tablojn, lavi bovlojn, poluri kuleregojn kaj purigi legomojn. Tiam estis popoldiro: "Eledukinte la metilernanton malsatmortas la majstro." Pro tio, ĝenerale la majstroj ne volis senrezerve instrui al aliaj siajn sciojn. Tiam mi, kvankam juna, jam profunde komprenis, ke sen lerni metion mi ne povas min vivteni. Do mi observadis, kiamaniere la majstroj elektas materialojn, ilin tranĉas, kunaranĝas kaj kuiras. Tiel

mi ŝtele lernis kuirarton. Tagmeze la majstroj siestis, mi dopurigis kaj ordigis la kuirejon, akrigis la tranĉilojn, poluris kuleregojn kaj ankaŭ pretigis viandajn striojn kaj haketaĵon necesajn por pladoj. Tiel mi laboris multajn jarojn. Rimarkinte, ke mi ĉiam estas obeema kaj diligenta, la majstroj iom post iom traktis min milde, kvankam indiferente. Poste ĉefkuiristo Ĝŭo la unua akceptis min kiel sian helpanton. Mi des pli zorgeme observis, memoris kaj konsultis. Ankaŭ alia majstro Ĝu instruis al mi sian plej lertan senostigadon. Laŭ nuntempa vidpunkto, tio estas aparta tekniko por prilabori krudmaterialojn. Dank' al mia persista praktikado mi ellernis tiun teknikon. Oni diris, ke mi faris senostigadon pli rapide kaj pli bone ol aliaj. Mi kapablas konservi kompletan formon de senostigita koko aŭ anaso kaj depreni la skeleton de fiŝo sen difekti ĝian figuron.




Post laboro

Ŝajnas, ke estas tre facile prepari pladojn kaj kukojn. Sed fakte tio postulas multajn sciojn de naturaj kaj sociaj sciencoj. Ekzemple, elekto de materialoj, varmigo, spicado, fermentado, nutro kaj higieno koncernas biologion, fizikon, kemion kaj medicinon; kaj la koloro, gusto, formo kaj ujo de pladoj rilatas al estetiko kaj historio. Unuvorte, kiel kuiristo oni devas posedi sciojn mult-flankajn. Mi pensis, ke por akiri sukceson en mia laboro mi devas, antaŭ ĉio, kleriĝi iagrade. En la infanaĝo mi vizitis lernejon nur duonjaron. En 1950, post la fondiĝo de la nova Ĉinio, mi partoprenis en kontraŭanalfabeteca kurso. Unu jaron poste mi jam scipovis legi. De tiam mi persistas en lernado. Tio ebligas al mi legi diversajn gastronomiajn librojn. Mi legas, studas kaj prove preparas pladojn. Dum la kuirado mi rigore sekvas regulojn pri kunaranĝo de materialoj, zorgeme procedas kaj delikate kuiras, por ke la plado havu variajn mildajn gustojn kaj belajn koloron kaj aspekton. Mi ofte iras al magazenoj rigardi vitrinan dekoracion kaj ŝtofajn desegnaĵojn, rigardas pozojn de floroj, birdoj kaj bestoj, faras notojn kaj bildojn kaj ripetade ilin esploras por akumuli materialojn por krei novajn malvarmajn pladojn.

Fengzejŭan estas unu el la tri vaste konataj restoracioj de Pekino servantaj per pladoj de Ŝangdong-provinco. Ĉiutage alvenas pli ol mil klientoj ĉinaj kaj alilandaj. Krom fari dekojn da tradiciaj pladoj de la restoracio, kiel ŝarknaĝilo stufita en fajenca poto, markolbaso fritita kun cepoj kaj porktripo kun kok-stomako kuirita en bolanta supo, ni ankaŭ renovigis kaj kreis aliajn pli ol 30 pladojn, interalie la kvargusta fiŝo, vaporumita fiŝo kun perlaj pektenoj kaj aliaj aparte plaĉas al klientoj. Kun la altiĝo de la popola viv-nivelo pli kaj pli multaj homoj aranĝis geedziĝan aŭ familian festenon en nia restoracio. Kiam ili manĝis la de mi preparitajn pladojn, ili ĉiam min laŭdis. Kaj tio forte spronis min.

Kiel mi jam diris, en la malnova socio mi deziris lerni la metion nur por vivteni min. Sed ekster mia atendo, en la nova socio mi atingis sukceson, miaj pladoj estas bonvenaj al ĉinaj



Feliĉa familio

kaj alilandaj klientoj, kaj mi, ordinara kuiristo, estas estimata de aliaj kaj eĉ havas ŝancon vojaĝi eksterlanden. En 1954, kiel membro de ĉina delegacio, mi vizitis Sovetunion kaj DR Germanion. Tie mi faris ĉinajn pladojn, kiaj kvarope stufitaj viandbuloj kaj fungoj kun viand-tranĉaĵo. Ili estis laŭditaj de niaj gastigantoj. En 1982 oni eldonis en Japanio la gastronomian libron "Panoramo de Famaj Ĉinaj Pladoj" kaj invitis min kaj aliajn du kuiristojn al Japanio por prezenti kuirarton. Mi faris Ŝandong-pladojn konigitajn en la libro kaj ricevis admiron de japanaj amikoj.

En la pasinta jaro mi partoprenis en kuirarta konkurso de famaj ĉinaj majstroj-kuiristoj. En la konkurso mi preparis jenajn pladojn: haliotoj kun pektenoj, markolbaso kun cepoj, kokidtranĉaĵo kun ovoblanko kaj supo de sepio-ovoj. Mi preparis ankaŭ malvarman pladon el dek unu materialoj gustantan sale, dolĉe, acide, pike kaj freŝe kaj karakterizitan per moleco kaj rompiĝemo. Pro la ĉarma aspekto kaj bona gusto de tiuj pladoj oni premiis min per medalo kaj pokalo.

En la malnova socio, por ne perdi siajn vivrimedojn, la majstroj ne volis instrui al aliaj sian kuirarton. Sed nun la afero estas tute alia. Ili ĝojas, ke ili havas daŭrigantojn. Ankaŭ mi estas tia. Mi ne nur gvidas metilernantojn en nia restoracio, sed ankaŭ invitite instruas gastronomion en multaj provincoj kaj urboj. Mi donas grandan atenton al baza trejnado. Mi kulturis proksimume 400 lernantojn, el kiuj nemalmultaj jam fariĝis elito de la kuiristoj en siaj entreprenoj. Sed estas iuj junuloj, kiuj ne amas tiun profesion, sed volas forlasi ĝin. Tio ofte min ĉagrenas kaj maltrankviligas.

Kompreneble, kuirejo ne estas edeno. Post tuttaga laborado en ĝi oni sentus sin iom "spir-manka". Nature, tiam oni volas eliri por sin refreŝigi. Mi havas feliĉan familion. Mia edzino, virta kaj diligenta, estis mia samvilaĝano. Plenkreskis niaj kvar gefiloj, el kiuj du laboras ankaŭ kiel kuiristoj. Mi preferas fari mian vivon enhavoriĉa kaj signifa. Ellitiĝinte je la sesa matene, mi ekzercas min per Tajĝiĉûan, speco de ĉina tradicia gimnastiko. En la 16-jara aĝo mi eklernis la luktarton. Dank' al la longdaŭra korpo-ekzercado mi ankoraŭ restas energio-plena, kvankam mi jam aĝas 52 jarojn. Mi flegas hejme dekkelkajn vazojn da floroj, kaj estas tre agrable por mi akvumi kaj aprezi florojn ĉiutage. Mi havas du amindajn genepojn. Kiam ili gaje iras ĉirkaŭ mi, vokante: "Kara avo!" tute forvaporiĝas mia laceco dum la tago.



ŜAŬ BIN:


# Ni intervjuis Ĉu Tunan



S-ro Ĉu Tunan

S-RO Ĉu Tunan, pli ol 80-jara, estas membro de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, vicprezidanto de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Fremdaj Landoj. Kiel verkisto kaj literaturisto-tradukisto, li verkis la romanon "Lando sen Malamo kaj Hipokriteco" kaj prozaron, tradukis la longan poemon "Kiu Povas Esti Feliĉa kaj Libera en Rusio?" de rusa poeto N. A. Nekrasov, la poemaron "Herbfolioj" de Walt Whitman de Usono, la rakontojn "Grekaj Mitoj kaj Legendoj" (la origina titolo: "Dioj kaj Herooj") de Gustav Schwab de Germanio ktp.

En 1981 li, Hujucz, Bakin kaj aliaj ĉinaj eminentuloj kune iniciatis la establon de "Amikoj de Esperanto". En la inaŭguro li estis elektita kiel ĝia prezidanto. Li havas profundan komprenon pri Esperanto, fervore subtenas nian lingvon kaj zorgas pri la ĉina Esperanto-movado de multaj jaroj, tial li estas amata kaj respektata de la ĉinaj esperantistoj. Antaŭ nelonge ni intervjuis lin en lia domo.



S-ro Ĉu Tunan intervjuata de raportistino de EPĈ (la dekstra)

Ĉe la pordo de la salono pendis ŝildo kun devizo skribita de li mem, kiu legiĝas: "Estu virta, nesubigebla, persistema kaj sindonema." Tiu simpla, klasika devizo majeste kaj forte kaligrafita tuj kaptis la atenton de ni tri: mi, alia raportisto de nia redakcio kaj Li Najŝji, vicĉefsekretario de ĈEL. Ni ĝin aprezis, dum s-ro Ĉu klarigis al ni la signifon de ĉiu ideografiaĵo. Poste li sin turnis al Li Najŝji dirante: "Mi opinias, ke 'persistemo' taŭgas por tiuj, kiuj dediĉas sin al Esperanto." Sidiginte nin, li daŭrigis: "La apero de Esperanto spegulis la deziron de subpremataj malgrandaj kaj malfortaj nacioj, kiuj postulis egalrajtecon en internaciaj kontaktoj kaj forlason de diskriminacio kontraŭ lingvoj. Ĝuste pro tio Esperanto ricevis subtenon kaj disvolviĝon en Ĉinio, malgraŭ la granda diferenco inter la ĉina lingvo kaj Esperanto. Caj Jŭanpej kaj Hujucz, iniciatoroj kaj organizantoj de la ĉina Esperanto-movado en ties fruaj jaroj, kaj iliaj sekvantoj faris grandan laboron por disvastigi la lingvon. Kompare kun ili mi estas ne pli ol Esperanto-amanto.

S-ro Ĉu eklernis Esperanton en 1919, kiam la progresemaj personoj de Ĉinio aktive pledis por "demokratio" kaj "scienco" kaj enkondukis en Ĉinion multajn novajn aferojn el la eksterlando, inkluzive de Esperanto. S-ro Ĉu, tiam ĉirkaŭ dudek-jara, lernis historion, geografion kaj

la anglan lingvon en la Pekina Porinstruista Instituto. Post kurso li memlernis Esperanton kaj povis legi facilajn Esperantajn legaĵojn. Sed poste pro la migrada vivo li interrompis sian memlernadon kaj ekde tiam neniam venis al li ŝanco lerni la lingvon.

Ĉe tio, s-ro Ĉu turnis sian paroltemon kaj diris kun rideto: "Sed mi estas ĉiam fidela al mia kredo al Esperanto, mia kredo estas profunda. 'Kredo' en la Ĉina lingvo ja signifas fidon kaj sopiron."

Li resumis sian kredon kiel la jenon:

Unue, la ĉiam disvolviĝanta scienco kaj tekniko mallongigas la spacon kaj tempon de la mondo kaj pli kaj pli oftigas kontaktojn inter la homoj. Sed en la hodiaŭa mondo ankoraŭ ekzistas pli ol 2 000 uzataj lingvoj, kio multege malhelpas la homaron en ĝia progreso. Tial estas necese havi internacian lingvon, kiu sentigas nenian historian antaŭjuĝon, nenian rasan diskriminacion, sed estas scienca, facila kaj belsona. S-ro Ĉu opinias, ke Esperanto ja estas tia lingvo.

Due, se Esperanto servos kiel komuna lingvo de la homaro, do ĝi multe faciligos ĉiutagan vivon kaj internaciajn kontaktojn al la diverslandaj popoloj, kiuj devos scipovi nur sian nacian lingvon kaj Esperanton. Kaj krome, UN, la registaroj kaj iliaj popoloj ne bezonos elspezi multan monon tiuflanke. Tiam nur per Esperanto oni povos lerni eminentajn kulturojn de aliaj nacioj, ĉu klasikajn, ĉu modernajn, kaj posedi plej avangardajn sciencon kaj teknikon. "Tial," montris s-ro Ĉu, "ni devas antaŭvidi, ke Esperanto faros nekalkuleblajn meritojn al niaj postaj idoj kaj alportos al ili feliĉon."

Poste li fervore prezentis siajn proponojn pri Esp-movado:

Unue, fari publikan opinion pere de Esperantaj laborantoj kaj Esperantaj organizoj en diversaj landoj, por ke la registaroj kaj iliaj edukaj departementoj agnosku aŭ sankciu Esperanton kiel nedevigan lernobjekton de diversnivelaj lernejoj, kaj poste, kiam la kondiĉoj maturiĝos, kiel devigan lernobjekton.

Due, Unesko starigu Esperantan grupon por esplori kaj perfektigi la lingvon, kulturi altnivelajn esperantistojn kaj antaŭenpuŝi la Esperanto-movadon.

Trie, Unesko fondu Esperantan bibliotekon kaj organizu elstarajn esperantistojn-tradukistojn de diversaj landoj, por ke ili esperantigu sialandajn famajn verkojn, dokumentojn kaj materialojn pri literaturo, historio, scienco, tekniko, medicino, farmacio, astronomio, geografio, eduko kaj aliaj, kiuj servos al diverslandaj popoloj en ties studado.

Kaj kvare, UN oficiale sankciu Esperanton kiel unu el siaj laborlingvoj, kiam la kondiĉoj estos maturaj. Kaj poste, kun la disvolviĝo de la homa socio certe aperos tia bezono ke UN oficiale difinu Esperanton kiel sian unikan laborlingvon kaj postulu, ke oni en ĉiuj internaciaj konferencoj aŭ kunvenoj uzu Esperanton sen interpretado.

Antaŭrigardante la estontecon de Esperanto, s-ro Ĉu priskribis: "Tiam Esperanto helpos la homaron eniri en la harmonian socion, kiu ne konos historiajn antaŭjuĝojn kaj rasan diskriminacion, nek ekspluatadon kaj subpremadon de homo al homo, kaj en kiu ĉiuj vivos egalrajte, amike kaj harmonie."

"Tiu socio estas ankoraŭ tre malproksime," mi diris.

"Jes," li emocie daŭrigis, "sed mi kredas, ke tiu malproksima granda celo estos akceptebla de la prudento de la homaro. Eĉ se tiu idealo ne efektiviĝos en niaj du generacioj aŭ en la postaj tri-kvar generacioj, ĝi nepre realiĝos en ne treege malproksima estonteco, ĉar niaj posteuloj estos pli saĝaj, pli agemaj.

Antaŭ adiaŭo s-ro Ĉu montris al mi paragrafon el sia antaŭa artikolo: "Ni estas firme konvinkitaj, ke la estonta homa socio certe estos tia, en kiu la popoloj de ĉiuj nacioj progresos kune, vivos egalrajte, amike kaj harmonie. Esperanto eble estos tre mallarĝa kanaleto aŭ tre malgranda espero, kiu kondukos al tia socio." Forstrekinte la vortojn "tre mallarĝa" kaj "tre malgranda", li diris: "Nun mi ne volas aldoni al ili ian ajn epiteton. Ja la historio pruvu ĝin."

Nerimarkite, nia interparolo daŭris jam du horojn, sed li sin sentis neniom laca. Ĉe adiaŭo li akompanis nin ĝis la pordo kaj diris: "Esperanto ŝuldos sian belan perspektivon al vi junuloj. Lernu diligente kaj strebu antaŭen!"

ESP-NOVAĴOJ

## JARKUNVENO DE LA JUNNAN-A ESP-ASOCIO

De la deka ĝis la dekkvara de aŭgusto, 1984, la Junnan-a Esperanto-Asocio okazigis jarkunvenon en Kunming, la ĉefurbo de Junnan-provinco, kun la temo "Normo de matureco en Esperanto". La prelegoj temis pri Esperanto-movado, instruado de Esperanto, Esperanto kaj natura scienco kaj teknikoj, Esperanto kaj socia scienco, Esperanto kaj literaturo kaj arto.

Ĝin ĉeestis lokaj esperantistoj kaj reprezentantoj el Esperantaj organizaĵoj de aliaj provincoj kaj urboj. La kunveno ludis bonan rolon en la interŝanĝo de fruktoj de studoj pri E. inter diversaj provincoj kaj urboj.



Inaŭguro de la unua Esp-kurso de Baŭĝji

## FONDIĜO DE LA ESPERANTA STUD-GRUPO DE ĈJIĈJIHAR


En la urbo Ĉjiĉjihar, Hejlongĝjang-provinco, nordorienta Ĉinio, 42 esperantistoj kaj Esperantaj subtenantoj kunvenis lastatempe kaj fondis la Esperantan Stud-grupon. La kunveno aprobis la statuton de la grupo, elektis ĝian estraron kaj diskutis pri la plano de la estontaj aktivadoj. La grupo konsistas el 60 membroj. En la sekvanta tago la urba radio-stacio disaŭdigis ĝian fondiĝon.

## LA UNUA ESPERANTO-KURSO EN BAŬĜJI

La urbo Baŭĝji situas en la okcidenta parto de Ŝenŝji-provinco, Ĉinio. La 20-an de junio ĉi-jare ekfunkciis ĝia unua Esperanto-kurso, en kiu lernas 110 kursanoj.

## LA UNUA MEDITERANEA KONFERENCO DE ESPERANTOLOGIO

Sub la aŭspicio de la revuo *Planlingvistiko*, kaj honore al la






Glumarkoj por la 70-a UK

Hispana Esperanto-Muzeo, en Vilafranca del Penedès (la katataluna ĉefurbo de la vino) okazis, de la 31-a de majo ĝis la 3-a de junio, la unua Mediteranea Konferenco de Esperantologio. Tiu ĉi iniciato celis vigligi la esperantologiajn esplorojn en sudokcidenta Eŭropo, speciale en latinidaj landoj. La temo de la konferenco estis *Leksikografiaj Aspektoj de Esperanto.* La konferenco okupiĝis unuavice pri vortaroj, larĝigante la temon al ĉiuj demandoj ligitaj al leksikografio; plie, ĝi proponis unikan okazon por la renkontiĝo de universitataj docentoj, akademianoj, esperantologoj.

## INFORMOJ EL FR GERMANIO

La Germana Esperanto-Asocio kaj Germana Esperanto-Junularo sukcese kunlaboras por prezenti Esperanton en la publiko. Eldoniĝas nun nova faldfolio kun la titolo "Ĉie trovi geamikojn . . . per Esperanto". La amas-komunikiloj nun bone atentas Esperanton. Post gazetara konferenco en Niendorf artikolo pri Esperanto de la plej granda germana novaĵagentejo furoris en la tuta lando. Oni ĉijare povas konstati ĉiam pli ŝveliĝantan lavangon da legant-leteroj, artikoloj kaj intervjuoj pri Esperanto, konforme al la proksimiĝantaj Universala Kongreso en Augsburg kaj Jubilea Jaro.

Dum la 62-a Germana Esperanto-Kongreso de la 6-a ĝis la 8-a de aprilo en Kassel la Germana Esperanto-Asocio akceptis novan statuton. Esenca novaĵo de la statuto estas reformo de membreco, t.e., difini la tiel nomatajn subtenantajn membrojn, kiuj eble ne regule pagas iun kotizon, sed subtenas la celojn de la Germana Esperanto-Asocio per unufoja donaco, ia helpo aŭ minimume per la subskriba deklaro kaj aliĝo. Tiel eblas varbi ĉiajn simpatiantojn kaj ankaŭ membrojn de aliaj Esperanto-organizaĵoj.

## KONGRESMARKOJ POR LA 70-A UK

Augsburg (FR Germanio) estos 2 000-jara urbo, kiu en la jaro 1985 festos la dumiljaran jubileon kaj la 70-an Universalan Kongreson de Esperanto. La kongresmarkoj estas pretigitaj kaj aĉeteblaj en la prezo de 1.20 FRG-markoj por folio kun 9 diversaj glumarkoj (+poŝtkotizoj) ĉe LKK por la UK 1985, c/o Hermann Schmid. Seitzstrato 14, D-8900 Augsburg, FR Germanio.

## KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Kolozsi Vldria (15-j.) Str. Dz. Groza Peter ul. 28. hoc. DITRAU 4214 ROMANIA dez. kor. kun amikoj pri diversaj temoj ĉefe el Hungario, Germanio, Francio, Rumanio.

* Kurko Isuzsanna (15-j.) Str. Hunga ur. 12 hoc. DITRAU 4214 Jud. Harghita ROMANIA dez. kor. kun amikoj pri diversaj temoj ĉefe el Hungario, Francio, Germanio, Italio, Ĉinio, Rumanio.

* Sergej Verŝinin (23-j.), dez. kor. pri jogo kaj aliaj temoj. USSR, 432021 Ulganovsk, Radischeva 34a-4.

* Tibor Nagy, Zalka M.u.4., H-2523 Sárisáp, Hungario, dez. kor. kun ĉinoj.

* 22-j. studentino vol. kor. tm. pri ĉiuj temoj. Adreso: Angela Mary Orro Silva, St. Dagloria 39, 12100-TAUBATE, Sao Paulo, Brazilo.

* 21-j. instruisto en elementa lernejo dez. kor. tm. pri diversaj temoj. Adreso: Piotr Rychlewski, Al. Wyzw 283, 8440-Pilawa, Pollando.


* Instruistino (52-j.) dez. kor. kun ĉina instruist(in)o prefere el la urbo Luoyang. S-ino J. Turbillon, 4, Jardin Ockeghem, 37000 TOURS, Francio.

* Studento pri matematikaj sciencoj dez. kor. kun ĉiaj seriozuloj precipe el ekster Eŭropo. Adreso: Matti Lahtinen, Ilmarisenk. 16-18 C37, 40100 Jyväskylä, Finnlando.

* Jeger Robert (15-j.) Str. Penes Curcan 28 Bl. Q30 ap Jud. Bihon. -3700. ORADEA, Rumanio dez. kor. pri diversaj temoj kun hungaro.

* 15-16-jaraj komencantoj dez. kor. kun esp-istoj pri literaturo, muziko, sporto, kinejo ktp. Adr. Peteresit kaj Kelemen Agnes, Str. V.I. Lenin Nr. 2, Liceul Sanitar, Odorheiu-Sewiesc 4150, Jud. tlarghita, Rumanio

# LOKOJ MENCIITAJ EN ĈI TIU NUMERO




1
Ŝenĝen
2
Tjanĝin
3
Lanĝoŭ
4
Ĝjaŭnan-gubernio, Ŝandong-provinco
5
La akvofalo Hŭanggŭoŝu (pendanta super Bajŝuj-rivero ĉe la limo de la buji-aj kaj mjaŭ-aj aŭtonomaj gubernioj Ĝenning kaj Gŭanling en Gujĝoŭ-provinco)
6
Kantono


# Hŭanggŭoŝu-akvofalo

de ĈAJ FANG


HŬANGGŬOŜU estas la plej granda akvofalo en Ĉinio kaj unu el la famaj akvofaloj de la mondo. Ĝi pendas super Bajŝuj-rivero ĉe la limo de la buji-aj kaj mjaŭ-aj aŭtonomaj gubernioj Ĝenning kaj Gŭanling en Gujĝoŭ-provinco en sudokcidenta parto de Ĉinio, 151 kilometrojn for de Gujjang, la ĉefurbo de la provinco. Depost kiam ĝi estis malfermita al eksterlandaj turistoj en 1982, ĝin vizitas unuj post aliaj turistoj el diversaj partoj de la mondo.

La baseno de la rivero konsistas ĉefe el kalka stratumo. Longtempa erozio kripligis la topografion. La riverlito en la fluejo falis kaj aperis ŝtupara krutaĵo. Hŭanggŭoŝu-akvofalon ĉirkaŭas 18 diversaj surteraj akvofaloj kaj kvar subteraj akvofaloj, kiuj punktas la lokon harmonie kaj formas ĉarman kaj maloftan akvofalaron.

El tiuj akvofaloj Hŭanggŭoŝu estas la plej alta, kun plej granda flukvanto. Ŝi havas altecon de 68 metroj kaj larĝecon de 81 metroj. Starante ĉe balustrado de la Akvofalorigarda Kiosko sur roko 300 metrojn for de la impona akvofalo oni povas klare vidi pejzaĝon de ĝi kaj la



La akovofalo Hŭanggŭoŝu




Enirejo de la kaverno "Draka Palaco"

ĉirkaŭo. En la malproksimo montoj ondas kaj Bajŝuj-rivero zigzagas suden kiel blanka rubando, verŝante akvon de sur kruta rokmuro en profundan lagon kun animskua bruego. La akvofalo disŝutas akverojn pli ol 100 metrojn alten, kiuj aspektas kiel nebulo ŝvebanta super la surfaco de la lago kaj portiĝanta inter montoj. Ĉielarkoj transverse etendiĝantaj super la lago jen aperas jen malaperas en la sunlumo.

Malsuprenirinte de la Akvofalorigarda Kiosko, trapasinte 409 ŝtonajn ŝtupojn kaj travadinte malprofundaĵon, oni povas atingi la "Akvokurtenan Kavernon" sur kruta rokmuro en la mezo de la akvofalo. La maldekstra pado kondukas al la kaverno kun longeco de pli ol 40 metroj. Estas rave rigardi en la kaverno la ĉarman akvan kurtenon.


Post kiam la akvo falas de sur la kruta rokmuro, ĝi iompostiome kvietiĝas kaj kurbe enfluas en vastan havenon. Tie regas plena kvieteco. La turistoj povas remante ĝui belan pejzaĝon ambaŭborde, interalie, ili povas vidi buji-ajn vilaĝojn ŝirmatajn de altaj arboj.

En la lastaj jaroj oni trovis en la ĉirkaŭaĵo de la akvofalo nemalmultajn kavernojn. El ili la plej ĉarma estas la kaverno "Draka Palaco", 30 kilometrojn for de la akvofalo. Ĝi estas granda kaverno kun subteraj lagoj. Por ĝin atingi kaj ĝui ĝian belon oni devas preni boaton.

La kaverno longas pli ol 3 000 metrojn kun ses subteraj lagoj profundaj je 7-17 metroj kaj multe da akvofaloj ene. Ĉirkaŭ la lagoj dissemiĝas 64 sekaj kavernoj grandaj kaj malgrandaj. Turistoj povas surbordiĝi por rigardi la mirindan kavernaron kaj la naturan ĝardenon kun stalagmitoj kaj ŝtonaj kolonoj, floroj kaj ekranoj.




Torentanta falakvo



Doŭpokŭang-akvofalo supre de Hŭanggŭoŝu

Alia akvofalo mal
supre de Hŭanggŭoŝ

Fotoj de **JAN ĜONGJI**





Ĉeno da falakvoj






# Retrovo de Reĝa Maŭzoleo Longe Perdita

de **CAŬ BAJLONG**

Fotoj de **ŬEN GONG**
kaj **BAJ LONG**




Jada ringo



Ora sigelilo kun drakoforma tenilo

Jada ornamaĵo kun ora hoko




EN la ĉina historia literaturo estas notite, ke Sun Ĉjŭan (182-252 p.K.), suvereno de U-regno en la historia periodo Tri Regnoj, deziris akiri trezorojn en la tombo de la reĝo de Nanjŭe-regno, enterigitajn en la suda regiono de Nanling-montaro (la nunaj Gŭangdong kaj Gŭangŝji). Tial li sendis milojn da armeanoj serĉi la tombon, tiuj tamen malsukcesis. De tiam forpasis pli ol mil jaroj kaj nun oni neatendite trovis tiun misteran reĝan maŭzoleon en Kantono.

## REĜLANDO NANJŬE

La unua reĝo de Nanjŭe estis Ĝaŭ Tŭo. Li estis generalo de Ĉin-dinastio (221-206 a.K.) garnizonanta sude de Nanling-montaro. En la lastaj jaroj de Ĉin-dinastio iris en Ĉinio senĉesa militado. Profitante tiun okazon Ĝaŭ Tŭo starigis sian lokan reĝimon — reĝlandon Nanjŭe kaj mem surtroniĝis. Post kiam Liŭ Bang (256-195 a.K.) unuigis la tutan Ĉinion kaj fondis Han-dinastion, Ĝaŭ Tŭo subiĝis al ĝi kaj estis nomumita de la Han-kortego kiel reĝo de Nanjŭe. En 137 a.K. la cent-jara Ĝaŭ Tŭo mortis kaj lia nepo Ĝaŭ Mej heredis la tronon, ĉar liaj filoj jam mortis pli frue. Ĝaŭ Mej tenis la reĝan potencon pli ol dek jarojn. Post lia morto la reĝlando daŭris tri generaciojn kaj fine estis konkerita de imperiestro Udi (156-87 a.K.) de Han-dinastio pro milita ĥaoso en tiu regno. La reĝlando daŭris sume 93 jarojn.

Historiaj libroj diras, ke post la morto de Ĝaŭ Tŭo oni sekrete entombigis lin por eviti tomboŝtelon. Tial oni ne sciis la tombolokon. Ankaŭ la ceteraj reĝoj de Nanjŭe eble estis sekrete enterigitaj, iliajn tombojn do neniu



Arkeologoj ordigas elterigitajn objektojn.

trovis poste. Sed nun tiu mistero estis malkaŝita.

## MALKOVRO DE LA SUBTERA PALACO

En iu junia tago, 1983, sur konstruejo de domego en Ŝjanggangŝan de Kantono, buldozoj intense laboradis por ebenigi monteton. Kiam la monteto estis malaltigita je 17 metroj, buldozo renkontis grandajn ŝtonplatojn, kun fendo du metrojn longa kaj tridek centimetrojn larĝa. En lumo de poŝlampo oni vidis sube ŝtonan tomboĉambron. Informiĝinte pri la novaĵo, arkeologoj tuj sin direktis tien. Ŝjaŭ Hŭang petis eniri por esplori. Oni ligis lin per ŝnuro kaj mallevis lin malsupren kaj atendis informon. Pasis naŭ minutoj, de sube aŭdiĝis krio: "Tiru min supren!" Oni tuj eltiris lin kaj vidis ke li estas tutkorpe plena de tero, kun gamosonorilo en la maldekstra mano kaj granda ronda jadplato en la dekstra. Unuapaŝa pririgardo konstatis, ke ĝi estas vertikala tombo kloŝo-forma, 20 metrojn profunda sur la montosupro. Ĝi estis granda ŝtona tombo konstruita laŭ la normoj de imperiestra tombo de Han-dinastio (206 a. K. — 220 p.K.). La tom-



Ŝtona pordo de la meza katakombo

bo estis 10.8 metrojn longa de sudo al nordo, 12.43 metrojn larĝa de oriento al okcidento kaj 3 metrojn alta. La tombo estas tegmentita per grandaj ŝtonplatoj. Arkeologoj certiĝis, ke tio estas eble maŭzoleo de iu reĝo de Nanjŭe.

## JADA VESTO KAJ ORA SIGELILO

Arkeologoj tuj komencis prifosadon de la maŭzoleo. Post koridoro estas ŝtona ĉambro, antaŭ kiu estas du ŝtonaj pordoj. Antaŭ la unua pordo estas amasigitaj ŝtonegoj, ĉiu pezanta je centoj da kilogramoj, eble por bari tomboŝteladon. Tamen la pordklapoj jam falis. Ambaŭflanke de la entomba koridoro kaj en la vestiblo troviĝis multaj argilaj vazoj kaj multe da valoraĵoj. Sur la argilaj vazoj estas ideografiaĵoj signifantaj "objekto de la palaco Ĉangle" kaj reĝa sigelo, kio montras ke tio estas reĝa maŭzoleo.

La ŝtonaj klapoj de la dua pordo estas dikaj kaj fortikaj, 1.8 metrojn altaj, 1.6 metrojn larĝaj. La du klapoj pezas almenaŭ unu tunon. Post ili estas la ĉefa ĉelo de la tombo. Ili estas strikte fermitaj. La arkeologoj levis ilin per gruo kaj poste eniris en la ĉefan ĉelon de tiu mistera subtera palaco.

La mastro de la tombo kuŝis iom okcidente en la mezo. La ĉerko jam putriĝis, restis nur ĝiaj postsignoj kaj lia skeleto. Li sin vestis per jada vesto, kiun portis postmorte imperiestro, imperiestra edzino, geprincoj, nobeloj kaj aliaj altranguloj de Han-dinastio. La vesto estas farita el pli ol 2 000 malsamformaj jadpecoj. Ĝi estas la dekdua jada vesto elterigita en Ĉinio kaj ankaŭ kompare pli frua el la elterigitaj jadaj vestoj. Ambaŭflanke de la jada vesto estis multe da jadaj ornamaĵoj, lokitaj proksimume je sama interspaco de la kapo ĝis la piedoj. La jadpecoj



Riparo de elterigitaj objektoj

estis belformaj kaj delikate ĉizitaj. Ambaŭflanke de lia talio estis dek feraj spadoj, ĉiu kun longeco de 140 centimetroj. Ili estas la plej longaj spadoj de Han-dinastio. Sur lia brusto estis jadaj ornamaĵoj kaj rozarioj el oro, arĝento, jado, bronzo kaj vitro. Sur kaj sub la jada vesto estis pli ol dek rondaj jadplatoj, ĉiu kun diametro de ĉ. 30 centimetroj.

La tombomastro portis ok sigelilojn. La plej granda el ili estas ora kuba 3.1-centimetra latero. Ĝi estas 148.5 gramojn peza kaj 1.8 centimetrojn alta inkluzive la drakforman tenilon. Sur la sigelilo estas gravuritaj ideografiaĵoj signifantaj "oficiala sigelilo de imperiestro Ŭendi". Ĝi estas la plej granda el la trovitaj oraj sigeliloj de Okcidenta Han-dinastio (206 a.K. — 8 p. K.). Samtempe oni trovis alian sigelilon de Ĝaŭ Mej. El tio ni estas konvinkitaj, ke la tombomastro estis la dua reĝo de Nanjŭe.

## KRUELA HOM-ENTERIGO

En la ses ĉeloj de la tombo oni trovis pli ol dek skeletojn, kiuj estis tiuj de kromedzinoj, muzikistoj, ĉaristoj, kuiristoj de la reĝo vive enterigitaj por akompani la mortintan reĝon. En la orienta ĉelo kuŝis kvar skeletoj, el kiuj unu portis sigelilon de "dekstra edzino" kaj alia sigelilon de "maldekstra edzino". Ilin akompanis oraj bidoj, jadaj ringoj, jadaj vestoornamaĵoj, bronzaj incensujoj, bronzaj lavkuvoj kaj aliaj luksaj valoraĵoj. Tie oni trovis ankaŭ bluetan travideblan vitron, 9.5 centimetrojn longan, 4.5 centimetrojn larĝan kaj 0.3 centimetron dikan. Jen la plej frua vitro trovita de ĉinaj arkeologoj. En aliaj ĉeloj oni ankaŭ trovis ĉe la mortintoj bronzajn spegulojn, bronzajn agrafojn k.a.

Tia kruela sistemo de hom-enterigo por akompani mortinton estis praktikata en la dinastioj Jin kaj Ĝoŭ (16 jc. — 11 jc. a. K.) kaj abolita en Han-dinastio. Sed Nanjŭe-regno praktikis tian sistemon, kio montris ke ĝi konservis pli da malnova barbara moro.

## SUBTERA MUZEO

Tie oni elterigis pli ol mil historiajn objektojn bronzajn, fajencajn, ferajn, jadajn, orajn, arĝentajn, eburajn, lakitajn, bambuajn, lignajn, kaj silkajn vestojn. Estas ankoraŭ granda parto da objektoj ne ordigitaj. Inter la elterigitaj objektoj estas ankaŭ bronza gamo-sonorilaro, ŝtonplata gamo-perkut-instrumentaro, bronzaj tripiedaj vazoj, bronz-kadra ekrano 3 metrojn longa, diametre 41-centimetra bronza spegulo kun kolora dorso, diversaj delikataj jadskulptaĵoj, kesto kun pli ol sepdek lignaĵistaj instrumentoj ene kaj aliaj valoraĵoj. Kultura administracio konstruas muzeon de Nanjŭe-regna reĝo sur la tombejo por eksponi la rarajn valoraĵojn al en- kaj eksterlandaj arkeologoj kaj turistoj.

ĜANG JINGĜI:

# Amiko de diverslandaj junaj turistoj

LA Junulara Turisma Servo de Ĉinio estas la plej juna el la tri grandaj turismaj servoj de Ĉinio. Kurantjare ĝi estas nur kvinjara. Malgraŭ tio ĝi jam havas grandan nombron da junaj amikoj tra la tuta mondo. Hodiaŭ ĝi jam starigis turismajn rilatojn kun pli ol 120 amikaj organizoj, societoj kaj turismaj servoj de junularo en pli ol 40 landoj aŭ regionoj. Ĝi akceptis pli ol dek mil junajn turistojn.

La Junulara Turisma Servo de Ĉinio havas klaran administran celon, t.e. "amikeco super ĉio, krome ankaŭ profito". La laborantoj, kiuj fervore servas en la 34 filioj tra la lando, ĉiuj prenas plifortigon de amikeco kun diverslandaj gejunuloj kiel sian ĉefan taskon. Ili varme akceptas la turistojn kaj, zorgante pri la apartaj interesoj de la gejunuloj, laŭeble aranĝas por ili abundajn kaj enhavoriĉajn vizit-programojn kun lokaj stiloj aŭ naciecaj karakteroj. Ekzemple, en la grandaj urboj, kiaj Pekino kaj Ŝanhajo, ili organizas amuzajn kunvenojn, studrondojn de kaligrafio kaj pentrarto kaj aliajn

Gaja renkontiĝo






Pikniko

literaturajn kaj artajn aktivadojn por ke la junaj turistoj renkontiĝu kaj interŝanĝu sperton kun ĉinaj gejunuloj. En Hujtengŝil de la Interna Mongolio ili speciale malfermis turisman lokon, kie tage la junaj turistoj povas plezure rajdi ĉevalon sur la vastega stepo aŭ partopreni en sagopafado, luktado ktp. Vespere ili povas sidi ronde en la mongola jurto kaj, gustumante buter-teon, spekti la entuziasmo-plenajn mongolajn kantojn kaj dancojn prezentatajn de mongolaj gejunuloj en akompano de la ĉevalkapa dukordo. En la fama tendumejo Malgranda Mejŝa de la provinco Gŭangdong, la elektronaj ludiloj kaj surmaraj amuzaĵoj allogas la gejunulojn. En la nordorientaj du provincoj Hejlong-



Servo al fremdlandaj turistoj



Lerni brodadon


ĝjang kaj Ĝjilin, la vintraj aktivadoj, kiaj skiado, sketado, spektado al la glaci-lampoj, veturado sur granda sledo tirata de cervo, hundo aŭ ŝafo, estas pretaj je dispono de la junaj amikoj. Ĉiuj ĉi aktivadoj ege plaĉas al eksterlandaj junaj turistoj.


La Junulara Turisma Servo de Ĉinio akceptas ĉiujare amikajn ŝipojn de junularo, vizit-grupojn de junularo kaj studentoj por tendumo kaj aliajn grandajn turistajn grupojn al Ĉinio. Krom vizito al vidindaj kaj pitoreskaj lokoj, laŭpete de la turistoj la laborantoj de JTSĈ ankaŭ organizas ilin por lerni la ĉinan lingvon, kanti ĉinajn kantojn, ekzerci sin en la ĉina bokso Tajĝiĉŭan kaj fari aliajn interesajn aktivadojn. Tiuj programeroj ne nur ege interesas la gastojn, sed ankaŭ donas al ili ŝancojn aprezi la ĉinajn kulturon kaj moron kaj pliigas ilian komprenon al Ĉinio.

En la lastaj jaroj, JTSĈ akceptis ankaŭ multajn fakajn turistajn grupojn el diversaj landoj, ekzemple la Turista Vizit-grupo al Ĉinio de Japanaj Arkitektoj, la Turisma Vizit-grupo al Ĉinio de Usonaj Kuracistoj kaj Flegistinoj, la Ensemblo de Japanaj Geknaboj el Morioka kaj la (Studenta) Ensemblo de Brigham Young Universitato el Usono. Por ili JTSĈ aranĝis ankaŭ kunsidojn, prezentadojn kaj prelegajn kunvenojn, kiuj helpis la interŝanĝon en la kampoj de kulturo, arto, scienco kaj tekniko inter la ĉinaj kaj alilandaj junuloj, kaj aktive efikas sur la importon kaj disvastigon de la fruktoj de fremdlandaj progresaj teknikoj kaj sciencoj.

La emblemo de JTSĈ estas 4 manskribitaj anglalingvaj literoj CYTS sur la fono de la verda tero. La etendiĝinta litero Y formas figuron de sovaĝa ansero, kiu kunportas pacon kaj amikecon al ĉiuj partoj de la mondo trans marojn kaj oceanojn, por varme bonvenigi la junajn amikojn el la tuta mondo viziti Ĉinion kiel gastojn de la Junulara Turisma Servo de Ĉinio.

Biciklado sur marbordo





Ĉinaj kuracistoj instruas akupunkturon al fremdlandaj studentoj.

# Eksterlandaj studentoj en Ĉin-medicina Instituto

LA ĉina medicino kun longa historio estas valora kultura heredaĵo de Ĉinio. Precipe ĝiaj simplaj kaj facile praktikeblaj terapioj kiaj akupunkturo kaj masaĝo estas ne nur vaste aplikataj en Ĉinio dum longa tempo, sed ankaŭ bonvenaj al pli kaj pli multaj eksterlandanoj, el kiuj iuj venis de malproksime al Ĉinio por lerni la ĉinan medicinon.

En la Pekina Ĉin-medicina Instituto troviĝas bela kaj pura



Helpate de ĉina kuracisto, jugoslava studento masaĝas malsanulon.



Meksikia studento kuracas la dispepsion de infano per knedo de ĝiaj muskoloj laŭ la spino.




Meksikia studento faras akupunkturon al malsanulo.

negranda domo, en kiu loĝas 31 studentoj el 9 landoj. La instituto elektis spertajn instruistojn por doni al ili lecionojn. Ili ne nur lernis ĉin-medicinan teorion en klasĉambro, sed ankaŭ iris al ĉin-medicina hospitalo por klinika praktiko, el kiu ili konis dialektikan kuracadon kaj posedis la manipulajn teknikojn de akupunkturo, knedo kaj masaĝo. Post dujara lernado ilia kuracarto atingis certan nivelon. Iuj resanigis malsanulojn en praktiko kaj estis laŭdataj de la pacientoj. Aliaj studentoj faris provizoran kuracan servon per la ĉina medicino dum ilia vizito al siaj familianoj kaj ricevis laŭdojn de la lokaj loĝantoj pro la evidenta kuracefiko.

Lastatempe alia nombro da eksterlandaj studentoj diplomitiĝis per bonaj sukcesoj en la lernado kaj revenis al sia patrolando.

Perua studento palpas pulson de malsanulo.



# La politiko de Ĉing-dinastio antaŭ la Opia Milito

de **BA HONG**




Imperiestro Kangŝji

ĈING-DINASTIO estas la lasta el la feŭdaj dinastioj de Ĉinio. Komence de la 17-a jarcento, Nuerhaĉi, la ĉefo de la manĉura nacieco, fondis reĝimon titolitan Ĝin, en la nord-orienta regiono de Ĉinio. En 1636, lia filo Hŭangtajĝi surtroniĝis kaj nomis la regnon Ĉing. En 1644 Ajŝinĝŭelŭo Fulin fariĝis la unua imperiestro Ŝunĝi (1644-1661) kaj la armeo de Ĉing okupis Pekinon, ĉefurbon de la dinastio Ming. Pekino fariĝis la ĉefurbo de la dinastio Ĉing. De tiam Ĉing-dinastio komencis sian regadon super la tuta Ĉinio kaj daŭris 268 jarojn, ĝis la Revolucio en 1911.

## PROSPERA PERIODO KANG-ĈJAN

En la feŭdisma socio de Ĉinio estis tri prosperaj periodoj: la flora periodo Ŭen-Ĝing (179-141 a.K.) de la dinastio Han regata de la imperiestroj Ŭendi (179-155 a.K.) kaj Ĝingdi (156-141 a.K.); la flora periodo Ĝengŭan (627-649 p.K.) de la dinastio Tang regata de la imperiestro Tajzong; la prospera periodo Kang-Ĉjan (1662-1795 p.K.) de la dinastio Ĉing regata de la imperiestroj Kangŝji (1662-1722 p.K.), Jong-ĝeng (1723-1735 p.K.) kaj Ĉjan-long (1736-1795 P.K.).

Tiu ĉi lasta daŭris 133 jarojn. En tiu tempo Ĉinio formiĝis en potencan unuecan landon kun multaj naciecoj. Ĝi havis senprecedence vastan teritorion: okcidente ĝis la montaro Congling, nordokcidente ĝis la norda bordo de Balkaŝo, norde ĝis Siberio, nordoriente ĝis la Ekstera Ŝing'an-montaro kaj la insulo Kuje (Saĥalin) kaj oriente ĝis Pacifiko. Ĝia sudoriento inkluzivis Tajŭan kaj la ĉirkaŭajn insulojn Djaŭju kaj Ĉiŭej; ĝia sudo inkluzivis la insularojn en la Suda Ĉina Maro. Ĝi fariĝis la plej granda lando en la orienta Azio.



Imperiestro Ĉjanlong inspektas en suda Ĉinio.

La imperiestro Jongĝeng, en sia regperiodo (1723-1735 p.K.) praktikis novan ter-impostan sistemon, tiel ke Ĉinio fariĝis la unua lando kiu abolis laŭkapan imposton en la mondo. Laŭ statistiko en 1795, la loĝantaro de Ĉing-imperio superis 300 000 000. De tiam Ĉinio fariĝis lando kun plej multa loĝantaro en la mondo. Tio estis rezulto de la flora periodo Kang-Ĉjan, kiu karakteriĝas per nacia unuiĝo, stabila socia vivo kaj prospero de ekonomio.

## IMPERIESTRO KANGŜJI

En la ĉina historio, imperiestro Kangŝji de Ĉing-dinastio famis pro sia talento same kiel la kvar eminentaj imperiestroj: la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio, Udi de Han-dinastio, Tajzong de Tang-dinastio kaj Tajzu de Song-dinastio. En la aĝo de ok jaroj li imperiestriĝis kaj en la aĝo de 16 jaroj li komencis mem decidi la ŝtatajn aferojn. Kvar jarojn poste, leviĝis armita ribelo de tri princoj. Ili tenis fortajn trupojn en la mano kaj faris separatisman militon tra duonlando. Kangŝji subpremis la ribelon per ok jaroj. La 28-jara imperiestro skuis la mondon per siaj saĝo kaj talento.

Kiam la milito kontraŭ la ribelantaj princoj iris triumfe, la juna Kangŝji faris gravan decidon repreni la insulon Tajŭan kaj insularon Penghu.

Deantikve Tajŭan estas ĉina teritorio. En la komenco de la 17-a jarcento, nederlandaj koloniistoj perforte okupis Tajŭan. En 1661, generalo Ĝeng Ĉenggong de Ming-dinastio komandis 25 000 militistojn kaj 350 militŝipojn kaj forpelis el Tajŭan la nederlandajn koloniistojn kiuj tiranis tie 38 jarojn. Post la forpaso de Ĝeng Ĉenggong, liaj gefiloj daŭre regis en la insulo. En 1681, imperiestro Kangŝji opiniis, ke maturiĝis la kondiĉoj por reunuigi la patrolandon, kaj sendis trupojn atakokupi Penghu-insularon. En 1683, la Ĝeng-familia regantaro en Tajŭan kapitulacis al la trupoj de Ĉing-dinastio kaj Tajŭan revenis al la patrolando.

Por reprosperigi la socian ekonomion, Kangŝji faris grandan klopodon. Li ordonis redoni al kamparanoj la kampojn, kiujn perforte forprenis la manĉuraj aristokratoj kaj princoj de Ming-dinastio. Li dekretis premii eksploatadon de virga tero, nuligi terimposton kaj grandskale entrepreni akvomastrumajn konstruaĵojn, kaj samtempe abolis la politikon malpermesi surmaran fiŝadon. Ĉio ĉi utilis al la prosperigo de ekonomio kaj komerco.

Kangŝji faris meritojn ankaŭ en solidigo de la nacia unuiĝo. Li frakasis la ribelon de aristokrato Gerdan de la Moŝji-a Mongola Ĝungar-tribo, subtenatan de la cara Rusio, en la baseno de Jili-rivero. Post kiam lia patro

imperiestro Ŝunĝi titolis Dalaj la Kvinan, ĉefon de la tibeta lamaismo, "Dalaj-lamao", Kangŝji donis al Banĉan la Kvina, viva budho de la alia lamaisma sekto, titolon "Banĉan-erdni". Per ĉio ĉi li plifortigis la rilatojn inter la centra registaro kaj diversaj nacimalplimultoj en Ŝinĝjang, Mongolio, Tibeto kaj aliaj landlimaj regionoj.

Kangŝji estis imperiestro senlaca en studado de kulturo de Han-nacieco kaj fremdaj landoj. Li diligente studis la konfuceanismon kaj tre respektis kaj kultis Konfuceon. Li aktive instigis la han-naciecan feŭdisman kulturon. Li koncentris ĉirkaŭ si multajn talentulojn pere de ekzameno kaj tial granda nombro da han-naciecaj intelektuloj estis en lia dispono. Li ankaŭ enoficigis fremdlandajn misiistojn por ke ili donu lekcion pri okcidentajn kulturo kaj scienco. Belgo Ferdinand Verbiest estis nomumita ŝtatoficisto respondecanta pri astronomiaj observo, mezurado kaj aparatfarado. La imperiestro fervore studis geografion de alilandaj misiistoj. Li interesiĝis ankaŭ pri medicino, muziko kaj arto de Eŭropo.

Alia grava kontribuo de Kangŝji estis batalo kontraŭ invado de la cara Rusio.

## TRAKTATO DE NIPĈU

Ĉe la finaj jaroj de Ming-dinastio kaj la komencaj jaroj de Ĉing-dinastio, okaze de la interna milito de Ĉinio la cara Rusio etendis sian forton orienten kaj entrudiĝis en la supran basenon de Hejlong-rivero. La trupoj de cara Rusio perforte okupis la lokojn Nipĉu (hodiaŭa Nercinsk en Sovetunio) kaj Jakesan kaj tie konstruis fortikaĵojn. Ili faris ĉian abomenindaĵon: prirabis ĉinajn loĝantojn, perfortis virinojn, bruligis domojn kaj tiel plu.

La registaro de Ĉing multfoje postulis la caran Rusion retiri la invadantojn el la ĉina teritorio kaj pace solvi la landliman problemon per intertraktado. Tamen la cara registaro tute ignoris la konsilojn kaj avertojn de Ĉinio kaj sendis plu agresantojn al Jakesan. En 1685 kaj 1686 Kangŝji dufoje sendis trupojn por rebati la carajn agresajn trupojn okupantajn Jakesan. Nur tiam la registaro de la cara Rusio sendis senditojn al Nipĉu por intertraktado. En 1689 Ĉinio kaj Rusio subskribis la "Ĉinian-Rusian Traktaton de Nipĉu". La traktato difinis, ke Gorbica-rivero, Erhkuna-rivero, la Ekstera Ŝin'an-montaro orienten ĝis la maro formu la landlimon inter Ĉinio kaj Rusio. La regiono norde de la Ekstera Ŝin'an-montaro, okcidente de Gorbica-rivero kaj Erhkuna-rivero apartenu al Rusio, kaj tiu sude de la Ekstera Ŝing'an-montaro, kaj oriente de la du riveroj apartenu al Ĉinio. Tiele oni leĝe determinis, ke la vasta regiono de la du basenoj de Hejlong-rivero kaj Usuli-rivero, inkluzive Kuje-insulon (Saĥalin) estas ĉina teritorio. La cara Rusio konsentis retiri sian trupon el Jakesan, dum Ĉing-dinastio koncesiis al Rusio Nipĉu oriente de Bajkalo, kiu origine apartenis al Ĉinio. La traktato de Nipĉu

Dekreto de la Ĉing-dinastia imperiestro Daŭgŭang, per kiu li nomumis Dalaj-lamaon la Dekunuan (en 1842)





Dekreto de la Ĉing-dinastia imperiestro Daŭgŭang, per kiu li nomumis Bajnĉen Erdini la Sepan (en 1846)

estis subskribita de Ĉinio kaj Rusio surbaze de egal-rajto kaj fundamente montris la starpunktojn de la du registaroj.

## RIĈEGA KORTEGANO HEKUN

Post kiam Ĉjanlong heredis la kronon, li senlace prizorgis la ŝtatajn aferojn celante potencigi la landon. La regado de Ĉing-dinastio atingis la zeniton de prospero. La ŝtato ĉiujare enspezis 30 000 000 taelojn da arĝento. Kaj la ŝtata kaso ofte rezervis 70 000 000 ĝis 80 000 000 taelojn da arĝento. La socia ekonomio kaj kulturo sin trovis en nova prospero. Tamen imperiestro Ĉjanlong ĉiam ĉasis famon kaj kondukis militon en sinsekvaj jaroj. La ŝtata elspezo ĉiam grandiĝis. Terura malŝparo troviĝis ankaŭ en ordigado de riveroj. La monavidaj mandarenoj respondecaj pri la ordigado okupiĝis pri malversacio. Krome, la imperiestro tre ŝatis inspektadon kaj ĉasadon sude kaj norde en la lando. Lia ekskurso estis ekstreme luksa kaj terure konsumis grandan monsumon de la ŝtato. En la posta duona regperiodo de Ĉjanlong, la politiko pli kaj pli putriĝis kaj subaĉeto kaj koruptiĝo fariĝis kutimo de burokratoj. Unu el la koruptiĝintaj korteganoj estis Hekun, favorato de la imperiestro Ĉjanlong. En 1796, mortis Ĉjanlong kaj surtroniĝis lia filo, kiu estis imperiestro Ĝjaĉing. Li delonge malkontentiĝis pri Hekun kaj en la kvina tago post sia imperiestriĝo enkarcerigis Hekun kaj konfiskis lian posedaĵon. La listo de konfiskitaj objektoj registris, ke Hekun havis pli ol 8 000 hektarojn da kampo, 75 lombardejojn, 42 malnov-stilajn privatajn bankojn, 13 butikojn de antikvaj objektoj, 106 ĝardenojn kaj vilaojn, grandan kvanton da oraĵoj arĝentaĵoj, juveloj, silkaĵoj, peltoj kaj aliaj. Liaj posedaĵoj valoris je pli ol 800 000 000 taeloj da arĝento. La konfiskitaj objektoj fariĝis posedaĵo de imperiestro Ĝjaĉing. Tiutempe financa deficito aperis en la diversaj provincoj de la lando. Pro la politika dekadenco, ankaŭ la armeo estis degenera. Armeoj militantaj en fronto eĉ kunportis komercistojn kaj prostituitinojn. La armeanoj ĉantaĝis la lokanojn pri mono kaj objektoj. La popolanoj vivis ĉiam pli mizere kaj klasaj kontraŭdiroj akriĝis tagon post tago. En multaj lokoj kamparanoj ribelis kontraŭ la registaro kaj forte batis la regadon de Ĉing-dinastio.

Kiam la registaro de Ĉing-dinastio iris al kolapso, la kapitalismaj potencoj en la mondo sin trovis en sia leviĝa stadio. De la komenco de la 19-a jarcento Britio direktis sian lancpinton de agreso al Ĉinio kun vasta teritorio, abunda rezervo kaj multa loĝantaro. Britio ankaŭ kaŝe transportis opion en Ĉinion por gajni arĝenton kaj veneni la ĉinan popolon. Tio kaŭzis la Opian Militon en 1840. Post tio, kapitalismaj potencoj konkure agresis kaj prirabis Ĉinion, kiu de tiam iris en duonkolonian kaj duonfeŭdan socion. Pri la moderna historio de Ĉinio post la Opia Milito, nia redakcio aperigis artikolojn de 1977 ĝis 1981, do ni ne ripetos tion.

# En Langoŭ-baseno

de **ŜAŬ BIN**

LA vespera suno iris sub la Leŭsan Altebenaĵon. Nia trajno rapide kuris suden, preter nigrajn konturojn de montetoj unu post alia. Tion mi rigardadis kaj enuigis. Imagu, kian animstaton havis la antikvaj generaloj kaj soldatoj, kiuj sin trenis de tiu dezerta loko al nordokcidenta Ĉinio por garnizoni sur la Granda Muro. Jen prezentiĝis alia monteto, multe pli granda. Iom post iom ĝi deflankiĝis, kaj subite saltis en miajn okulojn seninterrompa etendo de lamplumoj. En la vagono tuj aŭdiĝis el mikrofono la voĉo de parolistino. Ŝi konigis vidindaĵojn en Lanĝoŭ, kiel kvin fontoj de Han-dinastio, soforo de Tang-dinastio, Bajtatemplo de Jŭan-dinastio, latuna budhostatuo de Ming-dinastio kaj la unua fera pontego super la Flava Rivero konstruita en Ĉingdinastio. Tamen ŝi tute ne menciis la Grandan Muron de Ĉindinastio. Kie do ĝi kuŝas?

## MALAPERIS LA GRANDA MURO DE ĈIN-DINASTIO

La urbo Lanĝoŭ situas en la longa kaj mallarĝa Lanĝoŭ-baseno. Norde staras Bajta-monto kaj sude Gaŭlan-monto. La malklara Flava Rivero kirliĝante trafluas la urbon de okcidento al oriento. En la jaro 214 a. K. la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio konstruigis la Grandan Muron laŭlonge de ĝia suda bordo. Mi rapidis tien por rigardi, kaj tuj stuporiĝis.

Anstataŭ la antikva Granda Muro en senhoma valo mi vidis senfinan larĝan straton. Mi ekveturis per aŭtobuso de oriento al okcidento. La buso trairis vojkruciĝojn en la suda parto de la urbo. En la norda parto estas arboj, floroj kaj herboj, ŝtona balustrado surborde, la plivastigata Jantan-parko, infanludejo, kie regis ridoj, ĝojkrioj. . .

Kun dubo mi turnis min al iu specialisto pri la Granda Muro. Li konstatis, ke antaŭe tie ekzistis la Granda Muro konstruita en Ĉin-dinastio kaj rekonstruita en Ming-dinastio en 1573. Ĝi estis farita el tero, kun alteco de pli ol tri metroj.

Li legis en mi nekomprenon pri la malapero de la muro kaj klarigis al mi la kialon: Antaŭ ol la Unua Imperiestro de Ĉindinastio konstruigis la Grandan Muron, Lanĝoŭ-baseno estis dezerta valo. La urbo Lanĝoŭ siatempe portis la nomon Ĝinĉeng. Ĝi translokiĝis de Minhe-guberniо, Ĉinghaj-provinco, kaj fariĝis grava pasejo kondukanta al afrikaj, eŭropaj kaj aliaj aziaj landoj. Do la Granda Muro en Lanĝoŭbaseno fariĝis obstaklo sur la vojo. Ĝis la jaro 1949 restis nur ĝiaj ruinoj, kaj en la kvindekaj jaroj oni konstruis novan straton sur ili.

Vidinte mian malesperan mienon, li afable kondukis min al la urbomapo kaj montris ĝian okcidenton punktitan de fabrikoj, la ĉefan parton de Lanĝoŭ, urbo de petrol-kemiaj maŝinoj. "Iru tien kaj rigardu ĝiajn ŝanĝiĝojn," li diris. "Estas antikvaj versaĵoj:

*'Ĉin-regnon plifortigis la mirinda longa muro,*
*Ne l' dinastio tamen same longis en mezuro.'*

Ĉu vi komprenas?"

## LANĜOŬ, ĈEFA INDUSTRIA BAZO EN NORDOKCIDENTA ĈINIO

Mi volis remaĉi ĉion supre diritan, sed mian atenton kaptis la spektaklo sur strato: Kamparanoj veturigantaj azenĉarojn al la urbo, virinoj kun alta hararanĝo, blankaj ĉapoj de huj-oj moviĝantaj en homamasoj, lokaj melonoj sur standoj, ĉemizoj kun koloraj desegnoj sur nigra fono furorantaj en Pekino kaj Ŝanhajo. . .

El la fabrikoj de Lanĝoŭ tiu de petrol-kemiaj maŝinoj sidas plej proksime de la ruinoj de la Granda Muro. Ĝi estas la plej granda en Ĉinio kaj ĝiaj produktaĵoj vaste uzataj en la ĉinaj grandaj petrolkampoj kaj vendataj en la azia, eŭropa kaj amerika merkatoj. Mi venis al la fabriko ĝuste antaŭvespere de la 30-a datreveno de ĝia fondiĝo. Min akcep-

tis iu ĉefprojektistino. Ŝi diris, ke antaŭ du jaroj oni komencis reformi la ekonomian sistemon kaj de tiam la produktaj taskoj pliiĝis kun la facila vendado de produktaĵoj.

Ŝi pritraktis la ŝanĝiĝon de la ĉirkaŭaĵo de la Granda Muro. Antaŭ 30 jaroj en la urbo la stratoj estis malebenaj, la telefonoj ne bone funkciis kaj la elektraj lampoj ne hele lumis. Tiam en la loko, kiun la industria kvartalo nun kovras, krom malmultaj domoj, sterniĝis dezerta tero kun sennombraj tomboj. Nokte furiozis ventego kaj hurladis lupoj. Malgraŭ tio, volontuloj venis tien el diversaj lokoj de la lando kaj turnis tiun antikvan konsuman urbon kun nur 190 000 loĝantoj en gravan industrian bazon kun pli ol 2 300 000 loĝantoj. Ili ne estis tiaj, kiaj estis la antikvaj garnizonantoj kaptitaj de nostalgio. Ili konstruis tiun industrian urbon per sia optimismo, saĝo kaj firma volo.

"Kaj," ŝi daŭrigis, "la konstruon de nia industria urbo ni ŝuldas ankaŭ al la hidroelektrejo Liŭĝjaŝja."


## LA HIDROELEKTREJO LIŬĜJAŜJA


La nomita elektrejo, konstruita sur la Flava Rivero 70 km. for de la ruinoj de la Granda Muro ĉe Lanĝoŭ, ne nur liveras elektron al Gansu-provinco kaj ĝia ĉefurbo Lanĝoŭ, sed ankaŭ konsistigas gravan parton de la elektroreto en nordokcidenta Ĉinio.

Veturante en montaro, mi subite vidis blankajn nebulojn antaŭ mi ŝvebantaj ĉe la verdigita monttalio kaj leviĝantaj el sub la montvojo. Proksimiĝinte mi ĵetis la rigardon malsupren kaj ĝuis tre belan pejzaĝon en la valo: Muĝanta riverakvo torentis kaj fariĝis nebuloj, kiuj leviĝis alten en la aero kaj strekis belan ĉielarkon en sunbrilo. Sub la sepkolora ĉielarko brue dancis grandaj ondoj. . . Nur ĉi-momente mi ekkomprenis la poeziaĵon "ondoj kiel neĝo el la ĉielo" verkitan de granda poeto Li Baj de Tang-dinastio en la oka jarcento.

Sub la ondanta akvo estas la elektrejo brile lumigita kaj kvin grandaj generatoroj verde lakitaj, produktitaj de la Harbina Generatora Fabriko, kun totala

Ŝlim-pumpiloj produktitaj de fabriko de petrol-kemiaj maŝinoj





Parto de la kaverno-templo Bingling


kapacito de 1 205 000 kilovattoj. La spiralaj ŝtuparoj ambaŭflanke de la elektrejo kondukas al kavernoj kun kvin transformatoroj altaj kiel du-etaĝa domo, el kiuj la plej granda havas 360 000 kilovattojn. La elektrejo ĉiujare donas al nordokcidenta Ĉinio 5.7 miliardojn da kilovatthoroj da elektro. Montrante la bruantajn transformatorojn, s-ro Ĝjang, kiu akompanis min, diris: "Ankaŭ ili estas produktitaj de Ĉinio mem. La elektrejo estas armita ĉefe per ĉinaj ekipaĵoj."

"La elektrejo havas multajn junajn laboristojn, kaj tio estas ĝia alia karakterizaĵo." Parolante li kondukis min al la centra regadejo, la koro de la elektrejo. Tie la laboristoj aĝis meznombre malpli ol 30 jarojn kaj havis klerecon de mezlernejano. Sub direktado de 37-jara laborestro diplomita el altlernejo ili zorgis la kvin liniojn de la elektroreto de nordokcidenta Ĉinio. Vere, ili estis ŝarĝitaj per peza tasko.

"Ĉu vi amas vian laboron?" mi demandis junulojn, kiuj serioze laboris ĉe monitoroj kaj aliaj aparatoj. Ili ridetis al mi kaj daŭrigis sian laboron.

La laborestro diris al mi, ke tia laboro vere estas grava kaj streĉa, kaj iuj junuloj, ne povante plu elteni, fine forlasis ĝin. Sed la ceteraj amas sian laboron kaj plene aplikas siajn sciojn kaj talenton. Post la laborado ili ĉiam sentas ian fieron haveblan ne por ĉiu junulo.


Ni venis al la supro de la baraĵo kaj sidiĝis en plezurboato. Ni veturis en la verda akvorezervejo kaj vidis, ke akvoduktoj de irigacia konstruaĵo ĉe la Flava Rivero kiel drakoj supreniras monteton kaj tritiko bone kreskas nur deklivaj kampoj ĉirkaŭ la akvorezervejo. De tempo al tempo unu aŭ du balanciĝantaj flosoj el ŝafledo veturis kun penado de kamparanoj. Tia veturilo ekuzita en Han-dinastio en la torenta Flava Rivero vekis ĝojkriojn de la eksterlandaj turistoj en nia boato.




Bongustaj vermiĉeloj de Lanĝoŭ

Post turno de la boato, prezentiĝis antaŭ niaj okuloj pitoreskaj montoj. Tie estas budhisma sanktejo kun kaverno-templo Bingling farita en la jaro 385. Tie mi vidis malproksiman ŝtonan statuon de Majtrejo 27 metrojn altan, faritan en Tang-dinastio. Li sidas dorse al rokmuro kaj direktas fiksan rigardon al mi, kvazaŭ dirante: "Ĉin-dinastio la unua konstruis la kontinuan Grandan Muron, sed estas malfacile troveblaj ĉi tie la ruinoj de la muro. Ne dubu nek hezitu, sed skribu pri la moderna industrio kaj ĝiaj diligentaj konstruantoj."

**SUDE KAJ NORDE DE LA GRANDA MURO**









Ruino de la Granda Muro ĉe Lintaŭ,
ligita kun tiu ĉe Lanĝoŭ en la antikveco

Lanĝoŭ rigardata de supre. Ĉe la bordo
estas ruino de la antikva Granda Muro.





Landfamaj melonoj de Lanĝoŭ



Koloraj fajencoj eksponataj en la Lanĝoŭ-a Muzeo



Petrol-rafinejo de Lanĝoŭ, unu el la plej grandaj petrolrafinejoj de Ĉinio

Lanaj litkovriloj produktitaj de la Lanĝoŭ-a Lanteksejo





世界语《中国报道》一九八四年第十期（本刊代号：二——九一五）北京市期刊登记证第692号